



1/2 ☆ 1994 ☆ 159

**STARTO**

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

**67-a SAT  
KONGRESO Strážnice**

**16.-23. 7. 1994**



**SENNACIEGA ASOCIO TUTMONDA**

## Atendas nin malfacila jaro

Kutimas, ke prezidanto de asocio komence de la jaro skribas mesaĝon al la membraro, en kiu li kuraĝigas ĝin kaj skizas gravajn taskojn, kiujn la organizaĵo havas antaŭ si dum la komenciĝanta periodo. Oni antaŭvidas renkontiĝojn, kongresojn, seminariojn, novajn librojn, publikajn kursojn kaj tutan pladon da diversaj esperantistaj frandaĵoj. Ankaŭ mi volis, okaze al la nova jaro, fari la samon - ja, la ĉeĥan esperantistaron atendas someraj esperanto-tendaroj, SAT-kongreso en Strážnice, asocia konferenco, kelkaj kulturaj aranĝoj kaj aliaj. Apartan atenton meritas la ekfunkciinta Esperanto-muzeo en nia respubliko, kiu bezonas helpon de nia asocio. Mi volis per kelkaj vortoj skribi, kion necesas fari por plenumi la esperanto-kalendaron, kiun ni publikigas aliloke. Mi verdire jam skribis tiun mesaĝon, sed apenaŭ mi faris la lastan frazopunkton, oni enmanigis al mi informojn, kiuj devigis min ŝanĝi miajn vortojn destinitajn al membroj de nia asocio. En tiu momento mi ne rajtas kaŝi, ke nian asocion ĝuste renkontis problemoj, kiuj grave influos ĝian pluan agadon.

Pri ekŝigo de la sekretario oni jam informis en la pasinta numero de Starto. Sed post li ekŝiĝis el sia posteno ankaŭ la librotenisto, sen kiu ne eblas mastrumadi kun asociaj financoj. Ni ankaŭ ricevis malluigon el nia sidejo en Praha kaj tio signifas gravan minacon de plua ekzisto de nia asocio. Kompreneble, la komitato komencis intense serĉi solvon, kiu en tempo, kiam mi skribas ĉi malĝojigajn vortojn, ankoraŭ ne estas konata. Mi kredu, ke nun, kiam vi legas ilin, la situacio klariĝis kaj la komitato trovis kontentigan solvon. Estu la rezulto kia ajn, ĉiukaze la menciitaj eventoj naskos ŝanĝon de agadstilo de nia asocio. Ŝajnas, ke en proksima tempo ne plu ni povos atendi, ke ĉiun endan laboron plenumos sekretario, sed ĉiuj devoj disdividiĝos inter komitatanojn dise tra la respubliko kaj niaj membroj, do, devos ofte kontaktiĝi rekte kun tiuj. La laborkapablo, entuziasmo kaj intereso mankas al neniu el la komitato. Sed por ili kaj ankaŭ por vi venas malfacila jaro. Mi ja fidis al miaj kolegoj en la komitato kaj la komitato fidis al niaj membroj. Se ili forte apogos nin, ni venkos la neatenditajn malfacilaĵojn. Kaj nur en reciproka apogo povas nia asocio travivi la jaron 1994.

VI. Kočvara, prezidanto

**Nova adreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio:**

**ESPERANTO Praha, poŝta kesto 1069, 111 21 Praha 1**

## Esperanto-kalendaro de ĈEA 1994

### Aprilo:

6. - 12. 4. Pilgrimo al Romo (organizas Ĉeĥa kaj Pola IKUE-sekcioj)  
Inf.: M.Šváček, Tršická 6, 751 27 Pěnčice
8. - 10. 4. Renkontiĝo de SAT-amikoj en Ĉeĥa respubliko, Strážnice, prezo 120 Kč (tranokto)  
Inf.: V. Hasala, p.k. 34, 696 62 Strážnice
15. - 17. 4. Printempa renkontiĝo Opava. Organizas Fervojistaj sekcio de ĈEA kaj E-rondeto Ostroj Opava, prezo: 180 Kč, aliĝoj: MUDr. E. Kopečná, Pekařská 84, 747 05 Opava
16. - 17. 4. Printempa Adonido, Ratiškovice, organizas: E-Klubo Strážnice, aliĝoj: J. Melichárková 696 02 Ratiškovice, č.p. 938
- 25.- 30. 4. Lingva seminario Skokovy, pensiono Espero. Organizas Internacia Klubo de esperantistoj-handikapuloj. Inf.: Jos. Vaněček, Soukenická 58, 274 01 Slaný
29. 4. - 1. 5. Internacia printempa renkontiĝo de Esperantistoj, naturamikoj, Skokovy, pensiono Espero. Organizas: E-Klubo ĉe Kulturcentro Jablonec n/N. Aliĝoj: M. Jíra, Mechová 8-32, 466 04 Jablonec n/N.

### Majo:

7. 5. Kunsido de la komitato en Prago
21. - 24. 5. Postkongreso de IFEF-Kongreso, Břeclav. Organizas Fervojistaj sekcio de EA, aliĝoj: Jar. Pokorný, Nová 832, 691 42 Valtice

### Junio:

18. 6. Kunsido de la komitato en Prago

### Julio:

3. - 17. 7. Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, I-a etapo (skoltoj preferataj). Organizas: Esperanto-Klubo, Třebíč, prezoj diferencas laŭ membreco kaj aliĝdato. Aliĝoj: Esperanto, 674 01 Třebíč.
7. - 14. 7. Kolokvo de la Akademio de Esperanto, Prago, organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
9. - 16. 7. Antaŭkongreso de la 67-a SAT-Kongreso, Prago. Organizas: agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
9. - 16. 7. II-a Tutmonda kongreso de Esperantistoj-Handikapuloj, Kladno. Organizas: Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, p. k. 63, 274 01 Slaný

16. - 23. 7. 67-a SAT-kongreso, Strážnice, organizas: Sekcio de SAT-amikoj de ĈEA, prezoj diferencaj laŭ kategorioj kaj aliĝdatoj. Aliĝoj: SAT-Kongreso, p.k. 36, 696 62 Strážnice
17. - 30. 7. Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, II-a etapo, organizas: Esperanto-Klubo Třebíč
22. 7. - 5. 8. Flugkaravano al la 79-a UK en Seulon kun sekva kvartaga vizito de Japanio (elekteble la unuan japanan AIS-sesion aŭ turisman programon en Tokyo)
23. 7. - 6. 8. 13-a Katolika Esperanto-Tendaro Sebranice, organizas: Katolika sekcio de ĈEA. Prezoj diferencaj laŭ aliĝdato. Adreso: M. Šváček, Tršická 6, 751 27 Pěnčice
31. 7. - 13. 8. Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, III-a etapo. Organizas: Esperanto-Klubo Třebíč. Aliĝoj: Esperanto, 674 01 Třebíč

### **Aŭgusto:**

23. - 25. 8. 4-a Konferenco pri kibemetika pedagogio EDUTECH-94, Prago, laborlingvoj la angla, la germana, la ĉeĥa, parte Esperanto. Organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
27. 8. Kunsido de la komitato
25. 8. - 6. 9. Aŭtobusa karavano al SUS 13 (la 13-a SanmarinaUniversitata Sesio de AIS) de Prago post EDUTECH 94, organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. Petr Chrdle, Anglická 878, 25 229 Dobřichovice

### **Septembro:**

16. - 18. 9. Jarkonferenco de Fervojista sekcio de ĈEA, Pardubice, aliĝoj (provizore): J. Tomíšek, 751 18 Říkovice 33
24. 9. 7-a Esperanto-Tago en Pardubice, Kunĉeticka hora u Pardubic, organizas: E-Klubo dr. Schulhofa, Pardubice. Aliĝoj: E-Klubo dr. Schulhofa, Na okrouhliku 21, 530 03 Pardubice, limdato: 20. 8. 1994
30. 9. - 2. 10. 8-a Internacia Kultura Festivalo, Ústí nad Labem, organizas: Esperanto-Klubo Ústí nad Labem, aliĝoj: Ing. J. Kříž, Družstevní 411/11, 400 07 Ústí nad Labem. Limdato: 15. 8. 1994

### **Oktobero:**

(dato precizigota) - Konferenco de ĈEA, Česká Třebová, detaloj sekvos

8. 10. kunsido de la komitato
14. - 17. 10. Prago kultura kaj turisma, precipe (sed ne nur) por la partoprenantoj de la sekvantaj simpozio kaj dorsa lernejo, organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
10. - 17. 10. Entreprenado pere de Esperanto - la internacia simpozio, Skokovy, organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

17. - 20. 10. Dorsa lernejo - seminario por ĉiuj, kiuj suferas pri dorsdoloro. Eklerno de la metodoj, kiamaniere preventi ĝin. Gvidos spertaj kuracistoj D-ro Hradil kaj D-rino Kopečná, Skokovy, organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
20. - 23. 10. Tra turismaj perloj de suda Bohemio, turisma daŭrigo de la internacia simpozio por entreprenistoj kaj dorsa lernejo. Eblas ankaŭ aliĝi nur al ĉi tiu aranĝo; organizas: Agentejo Kava-Pech, aliĝoj: Dr. Ing. P. Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

### Novembro:

6. 11. Kunsido de la komitato

### Decembro:

10. 12. Kunsido de la komitato
28. 12. Esperanta Silvestro, Česká Třebová, organizas: Esperanto-Klubo Ĉ.Třebová, aliĝoj: C. Kotyzová, Drobného 1112, 560 02 Třebová
29. 12. 1994 - 2. 1.1995 riĉa turisma kaj amuza programo kun eblo ĝin plilongigi per skisemajno en ĉeĥa montaro Šumava

## Kalendaro de Esperanto-Centro en Poprad

6. - 8. 5. Internacia Renkontiĝo de Korespondkursanoj
6. - 8. 5. Printempa Renkontiĝo en Altaj Tatroj - PERAT '94
6. - 8. 6. VENDU KAJ AĈETU, internacia seminario de komercistoj-esperantistoj
3. - 16. 7. Somera Esperanto-Lernejo - SEL'94 - 1a etapo
16. - 22. 7. Turisma Semajno en Slovakia Paradizo - TUSE '94
7. - 20. 8. Somera Esperanto-Lernejo - SEL'94 - 2a etapo
9. - 13. 9. Mikologia Seminario (Terminologia agado, praktika fungokolektado)
14. - 20. 9. Aŭtuna Subtrata Semajno-Altmontara Turismo
9. - 22. 10. Aŭtuna Esperanto-Lernejo - AEL'94
18. - 20. 11. Kulturaj Esperanto-Tagoj
2. - 4. 12. Sankt-Nikolaa Festo - Renkontiĝo, Zakopane (Pollando)
30. 12. Silvestra Balo - Vintraj Ekskursoj

## INFORMOJ EL KLUBOJ

### Brno

La klubo devis en januaro transloĝiĝi, sed feliĉe baldaŭ trovis novan kunvenejon ĉe la adreso: Brno, Starobrněnská-strato, n-ro 15. La koresponda adreso de la klubo: Esperantista klubo Brno, p. k. 154, 657 54 Brno 2. Kunvenoj okazas regule ĉiumerkrede, la klubaj programoj en Esperanto komenciĝas post la 19a horo.

### Ústí nad Labem

Klubaj kunvenoj okazas lastan jaŭdon ĉiumonate je la 16a h. en Distrikta oficejo, Mírové nám. n-ro 633. Koresponda adreso: Ing. Josef Kříž, Družstevní 11, 400 07 Ústí nad Labem.

### La 8a Ĉeĥa - Saksa tago

la 11-an de decembro 1993 en Ústí nad Labem kunigis la Zamenhofan vesperon kun omaĝo al du ĉeĥaj E- eminentuloj festantaj decembre sian naskiĝtagon, nome Josef Vondroušek (89jara) kaj Jaroslav Mařík (80jara). El la manoj de la kluba prezidanto ing. Kříž ricevis la omaĝitoj diplomojn pri honora prezidanteco de la E-klubo en Ústí. Ambaŭ celebratoj eĉ prelegis en la matineo, kiam la ĉefa preleginto prof. Novobilský skizis iliajn vivovojojn kaj verkaron, menciinte ankaŭ la neĝisvivan jubileon de sia patro Jaroslav Novobilský pereinta en nazia koncentrejo.

S-ano Smyčka varbis al kunlaboro kun Radikala partio por fronti "la lingvan imperi-

ismon" kaj aludis la neĝisvivan 80-jariĝon de Štefo Urban, elstara E-komponisto, gitaristo, poeto kaj verkisto. Ĉefkuracisto pri internaj malsanoj, d-ro Pavel Páral, prezentis lastajn konojn rilate al AIDS.

Posttagmeza ekskurso gvidis la partoprenantojn al rekonstruita operteatro kaj al la tombejo en la antaŭurbo Skorotice, kie jam 5 jarojn ripozas Jiří Kořínek.

En la kultura vespero kantis Kateřina Kudliková, sopranulino el Nacia Teatro en Prago, kaj Miroslav Smyčka kun akompano de Jan Zimmel, violonis Jan Duda kaj 9-jara Zuzanka Urbanová, klarnetis Bohunka Šrutová, poemojn de Urban deklamis d-ro Vanc kaj lia filo Václav prezentis novan serion da sorĉaĵoj.

### E-rondeto en Česká Třebová

Esperanto-rondeto "Amikeco" en Česká Třebová organizas tradiciajn Silvestrajn vesperojn kaj balojn. La lasta "Silvestro" okazis 29.12.1993 (kaj ĉi-jare okazos 28.12.1994). Kutime partoprenas ĝin ankaŭ gastoj el najbaraj E-kluboj kaj rondetoj. Lastafoje vizitis nin amikoj kaj gastoj el Prago, Šumperk, Pardubice kaj ankaŭ eksterlandaj el Nederlando kaj el Žilina. Dum amuza vespero okazis diversaj konkursoj, ludoj, ŝercoj, kantado kaj dancado.

Esperantista balo por nefumantoj okazis en Česká Třebová 29. 1. 1994. Kiel kutime ĝi estis abunde vizitita. Venonte ni bonvenigos kun plezuro ankaŭ vin.

## Jubileo de la esperantaj elsendoj de Pola Radio

Ekde antaŭ 35 jaroj (4. 4. 1959) - okazas la regulaj elsendoj de Pola Radio en Esperanto. Nuntempe oni elsendas du programojn ĉiutage:

**15.30 h** - per kurtaj ondoj 25,39 m, 31,45 m, 31,50 m, 41,99 m, 48,90 m (t. e. 11815, 9540, 9525, 7145, 6135 kHz)

**22.30 h** - per kurtaj ondoj 48,90 m kaj 50,04 m (t. e. 6135 kaj 5995 kHz) kaj per meza ondo 200 m (1503 kHz)

Okaze de la 35-a jubileo de Esperanto-elsendoj organizas la Esperanto-Redakcio de Radio Varsovio konkurson, kiu enhavas tri demandojn:

1. Kio instigas vin aŭskulti la E-elsendojn de Pola Radio kaj kian signifon ili havas por vi?
2. Kion vi opinias pri la rolo kaj signifo de la Esperanto-elsendoj de Radio Varsovio en la tempo de grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj pri strebado al partnereco-paca kunlaboro sur nia kontinento?
3. Kigrade la E-elsendoj de Pola Radio proksimigas al vi la bildon de Pollando?

Por partopreni la konkurson oni devas respondi almenaŭ unu el la demandoj kaj respondon sendi ĝis la 30-a de junio 1994 al la adreso: **Esperanto-Redakcio de Pola Radio, PL-00-950 Varsovio, P. O. Box 46, Pollando.**

La lotumitaj gajnintoj ricevos E-librojn, popol-artaĵojn, muzikkasedojn kun kantoj en Esperanto ktp. Nepre partoprenu

ĉiuj esperantistoj kaj ne forgesu aldoni bondezirojn al la redakcio okaze de la jubileo.

### 80-jariĝo de Frank Buckley

Frank Buckley estas angla advokato kaj Esperanto-pioniro, verkisto, aŭtoro de dramoj (La Ĉeĥoslovaka Porko, La Feliĉa Familio, Domo Fantomata, Maria Martin, 9 Dzika Strato, Sally Bowles), komponisto de kantoj kiel "Ĝis la Reveno" kaj la kongresa uverturo "Esperantiana", reĝisoro de programoj por UK kaj aliaj internaciaj kunvenoj. Festante sian 70-jariĝon li ricevis pli ol 300 gratulajn bildkartojn el la tuta mondo, el kiuj li faris interesan propagandan ekspozicion en Bristol biblioteko. Li esperas prezenti similan ekspozicion el bildkartoj ricevitaj okaze de sia 80-jariĝo.

Bonvolu sendi gratulajn bildkartojn al la adreso: **Frank Buckley, 620LD, Filton Avenue, Bristol, BS12 7LD, Anglio.**



## Pri estetika valoro de lingvoj

Juliano Tuwim (1894-1953) estas unu el la plej grandaj polaj kaj mondaj poetoj. Liajn verkojn karakterizas kritika kaj satira sindefende ataka sinteno al la socio kaj al homoj, ĵaluze sendependa, senkompata skurĝo de ĉiaj malpravajoj kiel pompo, hipokriteco, bruteco... Pasia amanto de poezia arto, li kreis novan lingvon poezian kaj instruis al la tuta generacio de poetoj aprezon de parolaj vortoj. Supera majstro de lingvo... li ĝuas kaj ĝuigas al siaj legantoj personan kaj celan lingvokreadon, komprenon de estetika valoro de parolo kaj vorto.

Lia emo al ĝisfunda kompara ekkonno, al intelekta ekrego de la faktoj de lingvo gvidis lin en 1910, kiel studenton en Lodzo, al Esperanto. En Esperanto ankaŭ aperis liaj unuaj poeziaj provoj. Lia Esperanta verkado reflektas influon de Antonio Grabowski, - Tuwim neniam perdis kontaktojn kun Esperanto. Li ĉiam deklaris sin esperantisto. Sekvas fragmento el lia ĉapitro pri "Limito de fremdaj lingvoj" - speciale interesa por ĉiu esperantisto. (El la revuo "Esperanto", 1953, n. 3, tradukis Marek Waysblum)

### IMITO DE FREMDAJ LINGVOJ

Iu junulo, laŭprofesie absolute radikala patrioto kaj tutnacia diktatora kaj triumfa malklerulo (li agnoskis nur la "mistikajn sugestojn de intuicio", bedaŭrinde tamen tiu mistera sinjorino nenion volis sugesti al li) - do tiu junulo iam penis konvinki min, ke la lingvo internacia Esperanto similas t.n. "jargonon", t.e. judan lingvon. Mia interparolanto superis min en la diskuto, ĉar ne konante Esperanton, li

povis babilu, kion ajn lia abunda salivo metadis sur lian balbutan langon, dum mia konateco kun Esperanto datas de la jaro 1910. Aŭskultante sugestojn de sia silenta intuicio, la stultulo komprenis nenion, pri kio oni parolis al li, kaj per malestima rideto bagateligante ĉiujn objektivajn argumentojn, ĉiam denove ripetadis, ke la Zamenhofa lingvo "konsistas nur el iuj hoj, roj, moĵ, ŝmoĵ kaj estas pura judaĵo." - Evidente, li aŭdis iam, ke la pluralo de la deklinaĵoj vortoj estas formata de la finaĵo "-j". Kaj de tio lia sankta konvinko pri la sonoj "hoj - ŝmoĵ", kiuj, laŭdire, estas esence karakteriza por juda lingvo.

Anstataŭe, li ĝisĉiele laŭdadis la "sunbrilan lingvon de la antikvaj Helenoj", klarigante al mi, ke la sonoj de tiu ĉi (malnovgreka) lingvo reflektas (laŭvorte) la "estetikan valoron de la raso".

- Pardonu - mi diris al li - mi citos al vi fragmenton de Esperanta poemo kaj vi konstatos mem, ke ĝi ne estas tiel malbona.

Kaj mi recitis:

Palajsmath' hemon ho bios  
eutihusi de  
Hoj men tah' h oĵ d' esauthis  
hoĵ d' ede broton ...

(Eŭripido - La Petegantinoj, versoj 550-551, vortoj de Tezeo: "La vivo estas kvazaŭ lukto. Hodiaŭ unu superas, kaj morgaŭ iu alia.")

Mia intuiciulo triumfis:

- Nu, ĉu mi ne pravus? Hoj-hojmoĵ! Kaj ankoraŭ Ĥojsidel! Certe io pri Ĥasidoĵ! Oni aŭdas tion sur la strato Nalewski!  
(Ĥasidoĵ - mistika juda sekto, sinonimo por kultura malprogreso; Nalewski - unu el la ĉefaj



*stratoj en la antaŭmilita juda kvartalo de Varsovio; kompreneble neniiĝita de germanoj dum la insurekcio en la varsovia "gheto", 1943)*

Tiam mi metis lin sur mian maldekstran manplaton, perfingre klaketis lian nazeton kaj diris:  
- Ne, bubeto. Vi ne aŭdos tion sur la strato Nalewski. Tiuj sonoj aŭdiĝadis sur la atena agoro. Ĝi estas la poeto Eŭripido!  
(agoro - antikva foirejo, ĉefplaco)

La konkludo estis simpla kaj banala: "ne tio belas, kio estas belaĵo, sed kio plaĉas al iu"; alivorte "de gustibus non est disputandum" (pri gustoj oni disputi ne devas). Oni ne povas apliki objektivajn kriteriojn al lingvoj "belaj" kaj "malbelaj", (samkiel al lingvoj "facilaj" kaj "malfacilaj"). Aprezo de estetikaj valoroj de iu lingvo dependas de emocia tendenco, sentimento, eĉ antaŭjuĝo - kaj ies propra, gepatra lingvo estas konsiderata iagrade kiel la "idealo". La homaro parolas pli ol du mil lingvojn, kaj ĉiu nacio, tribaro aŭ tribo opinias, pro emociaj motivoj, ke ĝuste ĝia esprimmaniero estas la plej bela - kaj plej simpla. Tute nature: la lingvo, en kiu oni pensas, kiun oni parolas senpriripense, devas esti pli bona ol la aliaj. Lingvisto Schuchhardt, tenante glason enmane, demandis italan vilaĝanon, ĉu li scias, kiel ĝi nomiĝas? La kamparano respondis: "En unu lingvo ĝi nomiĝas tiel, en iu alia alimaniere - ma e un bicchiere e soltanto in italiano si chiama cosi" (sed ĝi estas glaso kaj nur en la itala lingvo ĝi tiel nomiĝas). Tiu respondo pravas, ke la nomo de aĵo en gepatra lingvo kuniĝas kun ties definitiva kaj unika vero, esenco, enhavo. La alta verdaĵo, kiun mi vidas tra la fenestro, estas nek "Baum" nek

"arbo" (mi devas devigi min pensi pri ĝi tiamaniere) - ĝi estas "arbo". Tial "arbo" estas pli bela por mi ol "Baum". Kaj tial "Baum" pli belas al germanoj ol "arbo".

Ni preterpasu la banalajn, kvankam ĝustajn ekzemplojn de vortoj plenaj de absoluta emocia enhavo (patrino, amo, patrujo, nomo de la amatino aŭ amato) kaj tiajn aksiomojn kiel: "Die Sonne ne brilas kiel la suno" (*die Sonne - germane "suno"*).

Ni konsideru sonoron de lingvoj tute al ni nekonataj, por ke - neŝarĝite de la signifo de vortoj - ni povu prijuĝi ilin nur laŭaŭde.

Unue aŭskultu amkanton havajan, kaj ni konstatu senpartie, kiom da simpleco kaj sentemo estas en tiuj ŝvebaj, fluemaj sonoj:

No ka mea, na aloha  
Nui mai ke akua  
I ko he so nei  
Nolaila ua haavi ...

Kiel tute alie sonas infana kanteto en la dialekto de la tribo Ireque en Afriko! Mallongaj, simplaj silaboj tuje transportas nin en gracion, naivan momenton de babilanta nigrueto:

Ba na ca nūia ni  
U nu nūa koŭe bi  
Bi nu ne nu  
Gi bi ŭe zara nu ...

Nun priskribo de tempesto en dialekto de unu el papuaj triboj. En la nekompreneblaj vortoj sonoregas murmuroj de tondroj, bruas ventego kaj minacas pendaj nuboj ŝargitaj de elektro:

God nou duriomoro gubugabu nuri  
magereri nou nauita adina mere  
nouro gagiŭai inaroro ŭiroŭairi  
...

Kaj lasta ekzemplo - batala kanto de la tribo *Luba-Lulua* en Kongo"

Buala bua nzambi  
ŭa katamba kusua  
bo ha  
bulo ba  
jeje ŭaka baha muan andi ...

Bruegas en ĝi tamburoj de la nigra popolo, nudaj piedoj de tatu-  
itaj militistoj batas la takton de  
l' batalo ... Ĉu ne?

**Bedaŭrinde NE!** Ree mi kulpas pri  
mistifiko: ĉiuj ĉi cititaj frag-  
mentoĵ estas verso el Evangelio,  
la sama verso el Sta. Johano  
(III/16): "Ĉar Dio tiel amis la  
mondon, ke Li donis Sian solenas-  
kitan filon, por ke ĉiu, kiu fi-  
das al Li, ne pereu, sed havu  
eternan vivon."

La legantoj pardonu min pro mia  
erarigo, sed mi volis montri, ke  
tio, kio estas "bela" aŭ "malbe-  
la" kiel amkanto aŭ batala kanto,  
kio estis sone ilustranta *tempe-  
ston* aŭ infanan *babilon*, subite  
iĝis io tute alia - tuĵ kiam ni  
ekkonsciis ties enhavon.

Kaj se nun ni revenos al la "ba  
na ca nŭia" aŭ al la "buala nua  
nzambi", ni perceptos la aŭdigi-  
tajn sonojn per tute aliaj "aŭdi-  
loj", ĉar ŝanĝiĝis la emocia at-  
mosfero, en kiu vivas la sonoj.  
Dum la dua legado solene kaj pre-  
ĝe fluos la nekompreneblaj sonoj,  
per kiuj ekzotaj popoloj gloras  
la Savanton. *Kaj ĉiuj estos same  
belaj.*

Katoliko, se li estas antisemito  
kaj konas nek la lingvon italan  
nek la judan, ĝuos sonojn de ita-  
la parolo, eĉ se ĝi konsistus el  
aĉaro de plej teruraj blasfemoj,  
kaj kun abomeno li aŭskultos t.n.  
ĵargonon, eĉ se oni legas al li  
la plej subliman preĝon en tiu  
lingvo.

Favora - kaj laŭnature sonora  
- temo por lingvisto-fonologo  
estus la lingva karikaturo kaj  
parodio de diversaj popoloj. Tiaj  
mokaĵ imitoĵ estas komunaj al  
ĉiuj nacioj. Unu najbaro moke  
imitas paroladon de la alia, opi-

nianta ĝin "komika" (polo la ĉe-  
ĥan), "malbela" (la judan) aŭ  
"malfacila" (la hungaran). Franco  
diras pri io nekomprenebla: c'est  
du grec (ĝi estas grekaĵo). Fran-  
ce oni diras ankaŭ: c'est de  
l'hébreu pour moi (ĝi estas heb-  
reaĵo por mi). Angloj: that's  
Greek to me aŭ that's double  
Dutch to me (tio estas greka al  
mi, tio estas duoble nederlanda  
al mi). Al la itala: parlo forse  
turco? (ĉu mi parolas turke?)  
respondas la germana: spreche ich  
vielleicht spanisch? (ĉu mi eble  
parolas hispane?).

La mala fenomeno estas ne nur nia  
(pola): przecież mówię po polsku  
(mi parolas ja pole), sed ankaŭ  
la germana: deutsch mit jemandem  
sprechen (paroli kun iu germane);  
komparu: deutschlich = klara,  
komprenebla, aŭ la franca "parler  
français" (paroli france) - la du  
lastaj frazoj signifas ankaŭ en  
la pola lingvo "diri veron en  
okulojn" (malkaŝe). Same en la  
angla lingvo: "to talk plain  
English to a person" (paroli klaran  
anglan lingvon al homo); komparu:  
plane et latine loqui (paroli  
simple kaj latine) ĉe Cicero. Por  
preskaŭ ĉiuj nacioj proverba iĝis  
la "ĉinajo". Ĉefion oni nomas en  
Ameriko "bootchkey" (de la ĉeĥa  
poĉkej - atendu momenton), la  
francan lingvon "parleywoo" (de  
la franca parlez-vous - ĉu vi  
parolas). Germano nomas trion  
familiarcon "pallebratsch reden"  
- de la koruptita pola "panie  
bracie" (sinjor' frato - arkaisma  
formo de patrone favora adreso:  
esti kun iu je sinjor'frato" -  
esti familiara kun iu).  
Multajn ekzemplojn de tiaj etno-  
faŭlismoj citas A.A. Roback en sia  
libro "A Dictionary of Interna-  
tional Slurs", (Cambridge, Mass.  
1944) (Vortaro de internaciaj  
ironiaĵ esprimoĵ).

## PRI LA MATEMATIKA TERMINO GRAFO

Ing. Jan Werner

Ŝanceliĝemo de esperanta matematika terminaro estas bedaŭrinda fenomeno, kiu demonstras la staton atingitan nur per agado de individuoj. Ĉiun individuan voĉon karakterizas nur limigita pravo. Mi ne estas escepto. Tamen, antaŭ ol venkos saĝo kaj esperantistoj elkonstruos aŭtoritatan terminologian establaĵon, mi volas tuŝi unu noción, kiu estas dume nomata GRAFIKAĴO, GRAFIO kaj por kiu mi rekomendas la terminon GRAFO.

**GRAFO en matematiko** estas strukturo donita per aro de nodoj kaj per aro de strekoj kaj per certaj rilatoj inter la elementoj de tiuj ĉi aroj.

**GRAFO generale en fakoj** estas ebena aŭ spaca rezulto de bildigo de rilatoj, procesoj, procedoj, statistikaj indikoj, funkciaj dependecoj.

Por la matematika nocio C.O. Kiselman proponas GRAFIO, R.Hilgers-Yashovardhan en la EK-vortaro proponis GRAFIKAĴO. El korespondado inter C.O. Kiselman kaj R.Foessmeier (majo-junio 1987) mi citas: "En la Matematikan terminaron mi enmetis ... GRAFIO por la angla graph... Pri GRAFIO mi hezitis. Jan Werner preferas GRAFO, spite al la fundamenta signifo de tiu vorto. Jouko Linstedt diras, ke GRAFO devus esti abstrakta vorto, kiu normale ne havas pluralon. Mi ne scias, ĉu li diras la samon pri la multaj aliaj vortoj, kiuj finiĝas per -io (funkcio, frakcio...), aŭ ĉu li pensas pri iu aparta signifo de grafio." El la respondo de R.Foessmeier: "Mi tute konsentas kun vi, ke la komuna signifo de GRAFO malpermesas ĝian uzon por via GRAFIO! Ankaŭ la argumento pri nenombrebleco de io-vorto ne ŝajnas al mi konvinka; do kial ne uzi GRAFION."

Estas vero, ke GRAFO estas fundamenta vorto, kiu esprimas certan nobelon. Sed indas aldoni, ke fundamenta estas ankaŭ la morfemo GRAF signifanta "priskribon" kaj devenanta el la greka "grafein" (gravuri; skribi). En la fundamento ĝi troviĝas en Ekzerco, par. 3, en la vorto GEOGRAFIO. Plue estas la morfemo en la Fundamenta Krestomatio, vidu GRAFOLOGIO, p. 194, linio 6.

Por neterminologoj mi aldonas tri gravajn informojn:

- a) En terminologio ni devas operacii per morfemoj, t.e. per la plej malgrandaj sencohavaj unuoj en la lingvo.
- b) Radiko por ni devas esti vortelemento, kiu estas ETIMOLOGIA BAZO de vortfamilio en unu aŭ en kelkaj lingvoj. Laŭ tiu ĉi instrukcio bazo de la vorto GEOGRAFIO estas GRAF. Ĝi estas samtempe radiko, diference de GEOGRAFI, kiu estas stamo (radikalo). Se iuj esperantistaj lingvofakuloj tion ne volas akcepti, tio estas ilia privata afero, sed indas, ke terminologo respektu la reviziitan version de la normo ISO 1087, kiu diras: "root - word element which forms the etymological basis of a family of words in one language or in several languages" (= radiko - vortelemento, kiu formas etimologian bazon de familio de vortoj en unu aŭ pluraj lingvoj). Diference de radiko (root) ni povas legi en la verko de ISO, ke stamo (stem) estas "word element which can be used as a term in itself or as the base of a derivative", (trad.: vortelemento uzebla mem kiel termino aŭ kiel bazo de derivaĵo). En la Terminologia kurso [2] mi samsence eksplikis stamon kiel tuton de terminologiaj morfemoj en unu ortografia vorto, sen gramatika finaĵo, do inkluzive kun afiksoj. Se stamo havas unu tian morfemon, ĝi estas radiko

kaj stamo samtempe. Ekzemplo: GEOGRAFI estas stamo, dum GEO (en Esperanto neuzata memstare) kaj GRAF estas radikoj, GRAF estas krome, en tiu ĉi kazo, semantika kaj etimologia bazo de la kunmetita vorto GEOGRAFIO. Se ni prenas la matematikan terminon GRAFO, ni povus diri, ke ĝia GRAF estas radiko kaj stamo samtempe. Estas vero, ke en lingvistiko ekzistas skoloj, kiuj eksplikas la supre menciitajn nociojn malsame, sed en la aplikata lingvistiko, kiu estas esenca parto de la interfaka scienco nomata terminologio, ni bezonas unuecan traktadon de problemoj. Estas prudente akcepti la rekomendojn de ISO (International Standards Organization).

- c) Pro limigita nombro de fenomenoj ne estas eble plene ekskludi homonimion. Estas dezirinde, ke homonimoj apartenu al fakoj malproksimaj. La komunikadon ne ĝenas ekzemple la homonimeco de GRAF (nobelo, skribo). GRAF en grekdevenaj vortoj sence varias.

F.C.Werner [1] montras tri signifosferojn de GRAF:

1. homa aktiveco,
2. aktiveco de animaloj,
3. provizi per desegnaĵo. Nin interesas precipe la unua. Ĝi estas nuancita tiel ĉi:

a) manuskripto, ekz. en ortografio, stenografio, grafologio;

b) skribrimedo, ekz. en grafito, kardiografo, kimografo;

c) bildigo, ekz. en fotografio, elektografio, kserografio; d) priskribo, ekz. en biografio, geografio, leksikografio.

Faka lingvostilo, precipe ĝia leksiko, estas en la lingvoj de evoluintaj nacioj planata. Estas utile kaj finfine ankaŭ relative facile atingi konvencion, ke la grek- kaj latindevenaj kunmetitaj vortoj ne estu arbitre malkompo-

nataj, ekz. geografio al geo kaj grafio, ĉar tia globale aplikata proceso estus malutila pro kresko de nedezirata sinonimio. Sed en iuj kazoj la vortoj jam ekzistas aparte, ĉu en radika formo, kiel ekz. spektro el spektrografo, spektrometro, ĉu en stama formo, kiel ekz. grafemo, grafiko, grafito. En tiuj kazoj la vortoj konsistas el la radiko GRAF, la sufikso (em, ik, it) kaj finaĵo. Prof. Kiselman al la radiko GRAF aldonas la sufikson "i", nekonsiderante ĝin sufikso. El terminologia vidpunkto ĝi estas netorelebla. Ni konsciu, ke la sufikso "i" estas grek- kaj latindevena kaj signifas plej ofte fakon, sciencon. GRAFIO estus fako pri bildigado. Sed lia celo estis nomi, nomumi "rezulton de bildigo," respektive en matematiko certan "strukturon".

Se estos interkonsentite uzi la morfemon GRAF, estos plej oportune kaj racie preni la morfemon sen plia afikso, ĉar

- a) same tion faras pluraj nacioj, ekz. angloj havas "graph", germanoj "Graph", francoj "graphie", rusoj "graf", ĉeĥoj kaj slovakoj "graf" kaj certe simile ankoraŭ aliaj nacioj.
- b) esperanto ne bezonas la verbon grafi por koncerna greka verbo, ĉar ĝi havas apartajn vortojn gravuri, skribi.

GRAFO do estu substantivradika kiel speciala matematika fenomeno, same en pluraj aliaj fakoj, kie ĝi estas malpli strikte difinata, laŭ la signifo iom proksime al diagramo, grafikono.

Koncerne la vorton GRAFIKO mi rekomendas, ke ĝi estu fake uzata nur por belarta reprodukta proceso, eventuale por sumo de ĝiaj rezultoj. GRAFIKAJO estu unu grafika artverko.

#### REFERENCA LITERATURO:

[1] WERNER, F.C. (1968): Wortelemente lateinisch-griechischer Fachausdrücke in der biologischen Wissenschaften. Max Niemeyer Verlag, Halle (Saale)

[2] WERNER, J. (1986): Terminologia kurso. Eld. Sdružený klub ROH, Roudnice n.L., Ĉeĥoslovakio.

#### RIMARKO de la redakcio:

Laŭ la ĉeĥa etimologia vortaro (Stručný etymologický slovník jazyka českého, SPN, Praha 1978) evoluis la nobela titolo "grafo" plej verŝajne el la greka "grafeus" (= skribisto), sekve ankaŭ la nobela titolo havas la saman etimologian originon.

#### JARO DE VĚRA MENČÍKOVÁ

Věra Menčíková, la unua ŝakĉampionino de la mondo, devenis el miksita geedziĝo de angla patrino kaj ĉeĥa patro František Menčík. Ŝi mortis la 27-an de julio 1944 en Londono. En la pasintjara FIDE-kongreso proponis la ĉeĥa delegitaro, ke la jaro 1994 estu proklamita jaro de Věra Menčíková same kiel la jaro 1992 estis jaro de Aljeĥin.

En marto 1994 okazos en Prago grandmajstra turniro de virinoj; inter la 25a-28a de marto en Znojmo efektiviĝis malfermita virina ĉampionado de Ĉeĥa Respubliko en rapida ŝako; maje en Svitavy Eŭropa ĉampionado de junulinoj kaj simpozio "Věra Menčíková kaj la nuntempo". Decembre oni aranĝos alian signifan ŝakkonkurson verŝajne en Hastings, kie Věra Menčíková vivis en la 20-aj jaroj kaj kie ŝi estis ŝaka lernantino de la hungara grandmajstro Géza Maróczy. Rusio, Ĉeĥio kaj Anglio - jen la landoj, kiujn Věra Menčíková sinsekve reprezentis. La unuan virinan mondĉampionecon en Londono 1927

ŝi gajnis sub la rusa standardo. En Hamburgo 1930, Prago 1931, Folkestone 1933, Varsovio 1935 kaj Stokholmo 1937 ŝi sukcese defendis sian titolon kiel ĉeĥino. En Buenos Aires 1939 ŝi ludis jam kiel anglino, ĉar oktobro 1937 ŝi edziniĝis al ŝaka redaktoro kaj eldonisto de British Chess Magazine R.H.S.Stevenson. Ŝia supereco super la rivalinoj estis absoluta kaj nuntempe neimagebla. En virinaj mondĉampionadoj ŝi ludis 80 partiojn, el kiuj nur unu estis perdita kaj kvar nulaj! Kiel unua virino sukcese ludanta en viraj ĉampionadoj ŝi elradikigis per decida maniero centjaran superstiĉon pri nekapablo de la malforta sekso konkuri en ŝako kun viroj. Eĉ la fratinoj Polgár ne povas fieri, ke ili ludis en turniroj 24 partiojn kun mondĉampionoj kiel Capablanca (9x), Aljeĥin (8x), Euwe, Lasker kaj Botvink! La stilo de Menčíková estis pozicia, trankvila, ŝi ne amis malklarajn implikiĝojn. Sed se la situacio postulis, ŝi sciis ekbrili per kombino, kiun multaj viroj ne nur silente, sed eĉ malkaŝe enviis. Grandmajstro Bronstein konfesis, ke plurajn siajn kombinojn li trovis nur dank' al rememoro pri similaj kombinoj de Věra Menčíková.

(laŭ Jan Kalendovský)

#### MORTIS VUK ECHTNER

Antaŭ nelonge sendis la komitato de ĈEA al UEA proponon aljuĝi honoran UEA-membrecon al eminenta Ĉeĥa esperantisto Vuk Echtner, sed nun atingis nin informo pri lia forpaso. Ni jam plurfoje skribis pri lia laboro por blinduloj kaj por nia pedagogia sekcio, okaze de lia 85-jariĝo reeltonis la E-klubo en Třebíč liajn bonegajn tradukojn el Ĉeĥoslovaka Antologio 1935 (sub titolo Sep tradukoj). Li apartenis al plej grandaj personoj en la historio de la ĉeĥa Esperanto-movado.

D-ro Evžen Wohlgemuth  
ĈU VI TIMAS HIRUDOJN?

La hirudoj estas tre konataj akvaj animaloj. La homoj plej ofte timas ilin, opiniante, ke la hirudoj sučas sangon. Nur ĉe kelkaj specioj la timo pravas.

La hirudoj havas korpon cilindroforman aŭ platan, kun du tipaj algluiĝemaj suĉiloj, la malgranda ĉirkaŭ la buŝo, la granda sur malantaŭa fino de la korpo. Vivante en plej diversaj akvoj, ili troveblas sur plantoj, sub falintaj folioj, sub ŝtonoj ktp. Surtere ili moviĝas algluiĝante per la suĉiloj, en akvo ili naĝas per onda movo. Kelkaj estas rabaj, voras malgrandajn akvajn animalojn, pluraj sučas sangon de aliaj vivaĵoj. Ili reproduktiĝas per ovo, metataj en plataj kokonoj.

La plej konata el niaj hirudoj estas medicina hirudo, 10-15 cm longa. La dorson ĝi havas multkolora de nigraj, brunaj kaj ruĝaj makuloj, la ventron nigra de nigraj makuloj. Ĝi vivas en stagnantaj akvoj de malaltaĵoj, sed nuntempe ĝi relative raras. La dentetoj de ĝiaj makzeloj kapablas tratanĉi homan haŭton, kaj la besteto povas suĉi homan sangon. La nomon ĝi ricevis de sia utiligo en medicino por skarifiko en la malnovaj tempoj. Alia granda hirudo, la ĉevala, ankaŭ 10-15 cm longa, havas la dorson malhelbruna, preskaŭ nigra, la ventron grizverda. Ĝi vivas en diversaj akvoj. La dentetoj de ĝiaj makzeloj ne kapablas tratanĉi homan haŭton, tamen ĝi estas raba kaj voras malgrandajn akvajn animalojn. La nomon ĝi akiris tiel, ke ĝi estis trovata en buŝa kavoj de ĉevaloj, kiam ili trinkis akvon de fiŝlagoj kaj riveroj.

En akvoj kun multaj fiŝoj troveblas fiŝa hirudo. Ĝi estas maldik, cilindroforma, 2-6 cm longa, kun granda rondforma malantaŭa algluiĝa suĉilo. Ĝian grizverde

transverse striitan korpon oni ofte povas vidi sur aĉetitaj karpoj. La homan sangon ĉi tiu hirudo ne povas suĉi.

Krom la menciitaj hirudoj vivas en niaj akvoj aliaj, malpli grandaj specioj. Eble la plej abunda estas la makulita hirudo, longa 4-6 cm, plata, bruna kun malgrandaj nigraj makuletoj. Ĝi vivas en diversaj akvoj, voras malgrandajn akvajn animalojn, sed ne kapabla suĉi sangon. Alia nia tre abunda specio, la ŝildetata hirudo, estas 3-4 cm longa, plata, flavgriza aŭ verdeta, kun bruna ŝildeto en antaŭa parto de sia dorso. Ĝi elsuĉas malgrandajn akvajn animalojn.

El niaj hirudoj danĝeras al homo nur la medicina. Ne estas rekomendinde eniri en akvojn, kie ĝi vivas.

LA TRIA UNESKO-REZOLUCIO  
PRI ESPERANTO KAJ EDUKADO

estis akceptita laŭ iniciato de Esperanto-Radiakala Asocio (ERA) dum la 27-a Unesko-sesio, finiĝinta la 16-an de novembro en la Pariza Unesko-sidejo.

La Ĝenerala Konferenco, **Memorigante** la Rekomendon pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco de 1974 kaj la Rekomendojn de la Internacia Kongreso pri Paco en la Menso de la Homoj (Yamoussoukro, Eburaj Bordo, 1989),

**Konsiderante** la fundamentan rolon kiun lingva komunikado alirebla por ĉiuj povas ludi en la antaŭenigo de paco kaj de interpopola kompreniĝo,

**Memorigante** la rezolucion IV.1.4.422-4224, per kiu la Ĝenerala Konferenco en 1954 en Montevideo rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo" kaj rekonis "ke tiuj rezultoj respon-

das al la celoj kaj idealoj de Unesko",

**Memorigante** la rezolucion 11.11, per kiu la dudek-tria sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko petis la Ĝeneralan Direktoron plu sekvi "kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj" kaj invitis la Ŝtatojn-Membrojn "instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado",

**Konsiderante krome** ke, en la kadro de lastatempaj studoj pri aŭtomata tradukado, ekzamenado de la specifa rolo kiun povas ludi lingvo kiel Esperanto povas montriĝi aparte grava,

**Petas** la Ĝeneralan Direktoron konsideri la rezultojn atingitajn de la movado disvastiganta Esperanton: (a) **en la Sinteza Raporto** pri ellaborado de instruprogramoj, pri trejnado de instruistoj kaj pri novigoj en la kampo de edukado por internacia kompreniĝo, paco, homaj rajtoj kaj demokratio, (b) en la redaktora **manlibro** pri gvidaj principoj por komunikado de pac-valoroj;

**Petas** tiucele la Ŝtatojn-Membrojn raporti pri agado plenumita kiel sekvo de la rezolucio 11.11. de 1985, precipe koncerne la studprogramojn pri Esperanto kaj iliajn rezultojn.

Kiel kutime ĉe proponoj submetotaj al la Ĝenerala Konferenco Federico Mayor aldonis noton:

1. La antaŭenigantoj de Esperanto havas celojn similajn al tiuj de la Organizo laŭ tio ke ili strebas konkrete faciligi la kompreniĝon kaj komunikadon inter popoloj kaj individuoj, kaj samtempe elimini potencialan fonton de nunaj kaj estontaj konfliktoj, kiujn kaŭzas konfrontiĝo de pensmanieroj kaj malsameco de esprimmanieroj.

2. La Ĝenerala Direktoro principe apogas la proponon kaj faros ĉion eblan por doni al ĝi sekvon en la kadro de la projekto "Linguapax" (27 C/5, par. 05220), kaj eventuale en la kadro de la Programo de Partopreno, se interesataj Ŝtatoj-Membroj submetos specifajn petojn.



#### Korespondi deziras:

**Vass Tibor**, Hungario. B-A-Z negye, H-3792 Scyóbány, Kur B.16. 19-jara pri ĉiuj temoj

**Julia Lisica**, ul. Semaforŝajna 19-157, Krasnojarsk 660 012, Ruslando. 21jara fraŭlino, universitata studentino, deziras korespondi kun viro el Ĉeĥio (vojaĝado, psikologio, skiado, bildkartoj k.s.)

#### El Italio:

**Biasio Silvia**, Via Ca'Molin 3, 35010 VILLAFRANCA (Padova) 17-jara studentino

**Tullio Elisa**, Via Campodoro 80, 35010 VILLAFRANCA (Padova). 17-jara studentino,

**Friso Fabris Roberta**, Via Leopardi 39, 350010 VILLAFRANCA (Padova). 39-jara vendistino

**Finotto Elena**, Via Matteoni 112, 35010 VILLAFRANCA (Padova), 40-jara oficistino

**Vettore Matteo**, Via Dante Alighieri 9, 35010 VILLAFRANCA (Padova), 15-jara studento

**Vettore Michele**, Via Dante Alighieri 9, 35010 VILLAFRANCA (Padova), 13-jara studento

**Mozzato Michele**, Via Ponte Napoleone 8, 36043 CAMISANO (Vicenza), 27-jara laboristo, fraŭlo

**Romio Pierpaolo**, Via Roma 58, 36043 CAMISANO (Vicenza), 28-jara profesoro, fraŭlo

## LA JARO DE ĈEĤA MUZIKO

La jaro 1994 estas jubilea jaro de grandaj ĉeĥaj komponistoj kaj tial tiu ĉi jaro estas nomata la Jaro de ĉeĥa muziko. Ni memorigu al ni iujn el la jubileantaj muzik-ĝeniuloj.

Nia plej konata komponisto **Bedřich Smetana** naskiĝis antaŭ 170 jaroj 2.3.1824 kaj mortis antaŭ 110 jaroj 12.5.1884. En la jaro 1864 estis unuafoje prezentata lia opero "Brandenburganoj en Bohemio" kaj en la sama jaro li komponis - kune kun la komponisto Vilém Blodek - muzikon por la Ŝejkspiraj Solenajoj. Dek jarojn poste - en 1874 - estis la unua prezentado de la opero "Du vidvinoj"; en la sama jaro li fariĝis surda.

Ankaŭ Vilém Blodek havas du jubileojn: antaŭ 160 jaroj li naskiĝis (3.10.1834) kaj antaŭ 120 jaroj li mortis (1.5.1874).

Antaŭ 90 jaroj, 1.5.1904, mortis Antonín Dvořák, la komponisto konata ankaŭ eksterlande. En la jaro 1874 estis unuafoje prezentita liaj operoj "Reĝo kaj rabisto" (la dua reverko) kaj "Duraĵ kapaĉoj", en la j. 1884 li vojaĝis unuafoje al Anglio, kie li fariĝis rekonata komponisto. En la j. 1893 en Usono li komponis la 9-an simfonion "El la Nova Mondo", kies unuafoja monda prezentado okazis 16.12.1893; en Eŭropo tiu ĉi simfonio estis prezentita unuafoje en Karlovy Vary 20.6.1894; la duan fojon en Prago 13.10.1894. En 1904 oni ludis unuafoje la lastan operon de Dvořák - Armida.

Alia granda komponisto Leoš Janáček naskiĝis 3.7.1854, do antaŭ 140 jaroj. Lia fama opero "Ŝia zorgatino" estis prezentita unuafoje en Brno 21.1.1904 kaj dudek jarojn pli poste en la Metropola operejo en Nov-Jorko. En la sama jaro 1924 en Brno okazis la unuaj prezentadoj de lia blovinstrumen-

ta sesteteto "Juna vivo" kaj la opero "Aventuroj de vulpino Ruzulino".

Kaj antaŭ 120 jaroj naskiĝis Josef Suk (4.1.1874), la disĉiplo kaj bofilo de Antonín Dvořák. En la jaro 1894 li kunfondis la Ĉeĥan kvarteton; en la j. 1904 estis la unua prezentado de lia simfonia poemo "Praga".

Sed en la nuna jaro havas jubileon ankaŭ pli fruaj komponistoj, la antaŭ-smetanaĵ, kie ekz. la blinda instruisto de B. Smetana Josef Proksch (1794 - 1864), la komponisto de unuaj ĉeĥaj operoj František Václav Miča (1694 - 1744), sed ankaŭ Bohuslav Matěj Černožorský (x 1684), Václav Jan Tomášek (x 1774), Leopold E. Měchura (x 1804), Josef L. Zvonař (x 1824) k. a. Ni ne forgesu ankaŭ pri la koncert-kantistino Josefina Dušková (1754 - 1824), la praga amikino de W. A. Mozart. El la pli novaj komponistoj kaj muzikistoj ni menciu almenaŭ Oskar Nedbal (x 1874), Pavel Božkovec (x 1894), Ervín Schulhoff (x 1894), Iša Krejčí (x 1904), E. F. Burian (x 1904), Karel Weiss (+ 1944), Jan Rychlík (+ 1964) kaj ankaŭ Jiří Šlitr (1924 - 1969), la komponisto kaj belartisto, por ni eterne juna, ĉar li mortis nur 45-jara.

En la jaro 1884 komenciĝis la regulaj spektakloj de la ĉeĥa teatro en Brno, en estinta gastejo en anguldomo de la strato Veverí; la 7.12.1884 estis tie unuafoje prezentita "Vendita fianĉino" de Smetana.

Antaŭ 160 jaroj, 21.12.1834, estis en la Nobelara teatro en Prago la unua prezentado de komedio "Fidlovaĉka", de Josef Kajetán Tyl, kun muziko de František Škroup. (Fidlovaĉka estis nomo de ĉiujara ŝuista foiro en la praga kvartalo Nusle.) En tiu teatraĵo unuafoje aŭdiĝis la kanteto "Ho, kie hejm'?", - nia ŝatata ŝtata himno.

- jpa -



## **Cu Nobel-premio en 1994 al Bohumil Hrabal?**

*La 28-an de marto 1994 festis 80-jariĝon ĉeĥa verkisto Bohumil Hrabal kaj samtempe li estis proponita kiel unu el kandidatoj de ĉijara Nobel-premio pri literaturo. Ni utiligu la okazon por prezenti nian ŝatatan aŭtoron al la internacia publiko.*

*En 1966 akiris ĉeĥa filmo de reĝisoro Jiří Menzel "Severe observataj trajnoj" la premion de usona film-akademio, Oscar. La aventuroj amaj kaj militaj de nesperia junuleto estis filmigitaj laŭ samnoma rakonto de Bohumil Hrabal.*

*Filmigitaj estis ankaŭ aliaj verkoj de Hrabal: "Hartranĉado, Festeno de neĝboruloj, Tenera barbaro, Alaŭdetoj sur fadeno" kaj nun oni preparas ankaŭ filmon laŭ lia lasta ĉefverko "Mi priservis la anglan reĝon".*

*Bohumil Hrabal naskiĝis en 1914 en Nymburk, kie lia patro administris bierfarejon. Trapasinte gimnaziojn en Brno, Nymburk kaj Český Brod li studis juron en Prago (doktoriĝo 1946) kaj poste gustumis multajn profesiojn: notaria oficisto, fervoja stokisto, laboristo, trajn-ekspedisto, asekur-agento, vojaĝ-komizo, ŝtallaboristo, pakisto de uzita papero, teatra kulisisto kaj fine verkisto.*

*La riĉajn vivospertojn el siaj okupoj li prilaboris en multegaj rakontoj verkitaj en poetisma stilo kaj originala formo. Ankaŭ la amromanon de siaj gepatroj en bierfarejo li bildigis kun ĉarma*

*humuro kaj rabeze riĉa lingvaĵo. Liajn akrobate fajrosprucajn esprimojn kapablus esperantigite eble nur Ivo Rotkvič, tradukinto de jeluŝiĉa Cezaro. Mi bedaŭrinde ne estas tia, tamen mi provos almenaŭ proksimigi al la idealo, prezentante fragmenton el "Hartranĉado", en kiu la patrino de la verkisto rakontas pri la bierfarejo, pri sia edzo Francin kaj lia frato Pepin - Jožin (Jozefo, dialekte).*

*Miroslav Malovec*

\*\*\*\*\*

Sur la kovrilo de skatolo kun muskolfortigilo tekstis: Ankaŭ vi posedos tiom belan korpon, tiom potencajn muskolojn kaj tiom teruran forton!

Kaj Francin ĉiumatene ekzercis siajn muskolojn, kiujn li havis same belegajn kiel la gladiatoro sur la kovrilo de tiu muskolfortigilo, sed Francin vidis sin mem kvazaŭ senfeligitan kuniklon. Mi metis sur hejtilon kaserolon kun terpomoj, ekprenis la skatolon kun la foto de belmuskola sportisto, kaj laŭtvoĉe mi legis:

- Ankaŭ vi posedos forton kiel tigo, kiu per unu bato de sia piedo mortigas bruton multe pli grandan, ol estas ĝi mem. -

Kaj Francin direktis sian rigardon al la trotuaro kaj muskolfortigilo forvelkis en liaj fingroj kaj Francin sterniĝis sur kanapo kvazaŭ subhakita dirante:

- Pepin -

- Ho, fine mi vidis vian fraton, fine mi aŭdos mian bofraton, bofraĉjon! -

Kaj mi apogis min je fenestra kadro, kaj tie surtrotuare staris

homo, surkape ovalan ĉapeleton, kvadratan rajdpantalanon mergitan en verdaj tirolaj ŝtrumpoj, la nazon li kurbigis kaj sur la dorso li havis soldatan portsakon.

- Oĉjo Jožin, - mi vokis sursojle, - bonvolu eniri. -

- Kaj vi moŝtas esti? - diris oĉjo Pepin.

- Nu, via bofratino, sinceran bonvenon! -

- Sakre, kia feliĉo pareni kun tiel ŝika bofratino, sed kie kaŭras Francin? - demandis la oĉjo trapuŝigante en la kuirejon kaj en la ĉambron. - Aha, ĉi tie, kio okazas kun vi? Vi, kuŝanta? Sakre, mi venis vizite al vi, ne pli por dek kvar tagojn,- parolis la oĉjo kaj lia voĉo barele tondris kaj segis aeron kiel flago, kiel oficira komando, kaj Francin, elektrizata per ĉiu vorto, saltleviĝis ĉirkaŭvolvante sur sin kovrotukon.

- Ĉiuj sendas al vi saluton, nur Bohalena ne, ŝin jam falĉis morto, ajna fripono farĉis ŝian ŝtipon per pulvo, kaj kiam la megero hejtigis, eksplodo klabis la megeran muzelon, ŝi svingiĝis kaj kuŝis rigida. -

- Bohalena? - mi kunfrapis la manojn, - ŝi estis via fratino? -

- Ho, kia fratino? ŝi estis bapтанino, maljuna megero, kiu tutan tagon glutis pomojn kaj kukojn kaj tridek jarojn sentencis: Infanoj, mi baldaŭ kadavriĝos, nenion mi emas fari, nur dormaĉi... kaj mi mem ankaŭ ne tute sanas, - diris la oĉjo kaj malligis la ŝnuretojn de la portsako kaj elŝutis surplanken la ŝuistan ilaron, kaj Francin aŭdinte la grincan bruegon, almetis la polmojn sur la vizaĝon kaj veis, kvazaŭ

la oĉjo estus enŝutinta la ŝuistan ilaron en lian cerbon.

- Oĉjo Jožin, - mi diris kaj alŝovis bakpladon, - servu vin per kukoj. - Oĉjo Pepin formanĝis du kukojn kaj deklaris: - Iel mi ne sanas.-

- Oj, - mi falis surgenuen kaj kunfrapis la manojn super la formiloj, marteloj kaj alenoj kaj ceteraj ŝuistaj laboriloj.

- Atenton! - ektimis la oĉjo, - ne malpurigu ilin al mi per tiuj viaj longaj haroj, ho Francin, pastro Zbofil tiel grave rompis al si la gambon en la kokso, ke li restos lazara ĝis la morto. Oĉjo Zaviĉák riparis tegmenton sur la preĝejo turo kaj benko sub li subglitis, kaj la oĉjo flugis malsupren, sed li kaptiĝis sur la hormontrilo kaj tenis sin per la manoj sur la montrilo de la horloĝo, sed la montrilo cedis, de kvarono post la dekonua la montrilo sinkis al duono post la dekonua, kaj la oĉjo ŝove svingiĝis, la manoj forglitis de sur la montrilo, kaj la oĉjo falis malsupren, sed tie staras tilioj, kaj la oĉjo enflugis en branĉaron de unu el la tilioj, kaj pastro Zbořil, rigardante tion, kunmetis la manojn kaj vidis, kiel de branĉo al branĉo falas oĉjo Zaviĉák kaj surteriĝas surdorse, kaj la pastro tuj kuris gratuli lin, sed li stumbe transflugis ŝtupon kaj falis kaj rompis al si la gambon kaj tial la maljuna Zaviĉák devis enambulanci la pastron, kaj oni fortransportis lin en la hospitalon en Prostějov. -

Mi levis lignan formilon por sinjorina ŝuo kaj karesis ĝin.

- Tre belaj objektoj, ĉu, Francin? - mi diris, sed Francin ekveis, kvazaŭ mi estus montranta al li raton aŭ

ranon.

- Belaĵoj, kaj kiaj, - esprimiĝis la oĉjo kaj elpoŝigis nazumon, surmazigis ĝin, kaj la nazumoj estis sen vitroj kaj Francin, vidante la nazumon sen vitroj sur la nazo de sia frato, ekjelpis, preskaŭ ekploris kaj turniĝis al la muro kaj jetiĝadis kaj la kanapaj risortoj veis kiel Francin.

- Kaj kion faras la oĉjo ĉe la Lagoj?  
- demandis mi.

La oĉjo malrespekte svingis la manon kaj ekpulis la ŝultron de Francin kaj turnis lin al si kaj per manumata voĉo entuziasme pentris al li:

- Do oĉjo Metudo ĉe la Lagoj komencis iel strangiĝi kaj tial li legis en gazeto: Ĉu vi enuas? Aĉetu lavurson procionon. Kaj ĉar oĉjo Metudo estis sen infanoj, li skribis laŭ la anonco, kaj post semajno la lavema urseto venis en kesto. Nu, ĝi estis donaco! Kiel bebo, ĝi amikis kun ĉiu, sed kion ĝi vidis, ĉion ĝi lavis, al oĉjo Metudo ĝi lavis vekhorloĝon kaj tri brakhorloĝojn tiamaniere, ke neniu refunkciigos ilin denove. Foje ĝi lavis ĉiujn spicojn. Alian tagon, kiam oĉjo Metudo malmuntis biciklon, la prociono forportis la unuopajn pecojn en la rivereton, kaj la najbaroj alvenadis kaj demandis: Oĉjo Metudo, ĉu vi ne bezonas la fatrasojn? Ni trovis ilin en la rivereto! kaj kiam ili alportis plurajn partojn, oĉjo Metudo iris rigardi, kaj la lavurso jam disportis preskaŭ la tutan biciklon. La kukoj efektive bongustas. Kaj la urseto iradis neceseji sole sur malnovan ŝrankon, kaj la tuta domo jam fetoris pro la

necesejo, fine ili devis antaŭ la besteto ĉion ŝlosi kaj eĉ nur flustris. La kukoj frandigas, domaĝe, ke mi ne sanas. Sed la urseto rimarkis, kien ili metas ŝlosilon, kaj ĝi malŝlosis, kion ili kaŝis antaŭ ĝi. Sed plej turere, ke la prociono vespere embuskis, kaj kiam oĉjo Metudo kisis la onklinon, ĝi jam grimpis supren kaj volis kison ankaŭ, kaj tial oĉjo Metudo devis kun onjo Rozina rendevui en arbaro kiel en fraŭla junaĝo, kaj tamen ili senĉese rerigardis, ĉu la urseto ne staras post ilia dorso. Do ili vere ne enuis, sed foje ili forveturis por du tagoj, kaj la lavurso tiom enuis dum la Sankta Spirito, ke ĝi disjetis la grandan kahelan hejtilon en la ĉambro kaj porkumis tiom la meblaron kaj kusenajn kaj tolaĵojn, ke la oĉjo altabliĝis kaj skribis al Moravia Aglino anoncon: Ĉu vi enuas? Aĉetu lavurson! kaj de tiu tempo li estas kuracita de melankolio. -

La X-a datreveno de aperado de ACTA KOMENIANA Sborník J. A. Komenského (esploroj pri la verko kaj vivo de J.A.) estis temo de Kolokvo en la Filozofia Instituto de ASC. en Prago, la 4an de febr. 1994. Jaroslav Mařík uzis la sekvan diskuton por memori pri la aktiva sinteno de J.A.K. al plaulingvo, kiukaŭze Komenio estis nomita de la komenilogo Jan Hýbl "La patro de la ideo de Esperanto." Jam tri rezolucioj de UNESCO apogas la rolon de la internacia lingvo Esperanto. La ĉefo de la Kolokvo akceptis ĉehlingvan artikolon de prof. J. Hendrich "Artefarita lingvo laŭ J. A. Komenský".

## LIDIA ZAMENHOF - 90 jaroj

La plej juna el tri infanoj de Zamenhof, Lidia, naskiĝis en Varsovio la 29an de januaro 1904. Ŝiaj gepatroj estis liberpensaj judoj, kaj ili donis al ŝiaj filo kaj filinoj bonan edukon. Adam Zamenhof fariĝis la plej elstara okul-specialisto de tiu urbo; Zofia estis kuracistino; kaj Lidia ricevis sian diplomon L. L. M. (doktorino pri juro) de la universitato de Varsovio. Estis neeviteble, ke Lidia Zamenhof estu idealistino. Amo al la tuta homaro trapenetrus la atmosferon de ilia malluksa hejmo, kaj kune la gepatroj edukis infanojn en la spirito de monduneko kaj frateco. Estis komprenebla rezulto, ke, kiam ŝi ricevis sian diplomon L. L. M. en 1925, Lidia decidis ne praktiki la juron, sed dediĉi sian tempon al la disvastigado kaj instruado de Esperanto. Kiel rajtigita instruistino de la Internacia Czech-Instituto de Esperanto en Hago, ŝi vojaĝis kaj instruis en multaj landoj de Eŭropo. Ŝi fariĝis la plej ŝatata instruistino de la Instituto, krom pastro Czech, ĝia fondinto.

Dio korfavore donacis al Lidia multajn talentojn. Ŝi estis denaska instruistino kaj prelegistino, kaj ŝia kapableco kiel tradukistino estis nesuperebla. Frue en sia kariero ŝi esperantigis la konatan verkon de Sienkiewicz "Quo vadis?", kelkajn liajn rakontojn, same kiel novelojn de Boleslaw Prus kaj "Iridiono" de la klasika pola aŭtoro Krasinski. Konata estas ankaŭ ŝia traduko de la kanto "Krokodilo".

Kiam ŝi alprenis la religion de Bahá 'u 'lláh, ŝi dediĉis siajn

talentojn entute al la Bahaa Afero. Multaj el ŝiaj inspiraj artikoloj estis publikigitaj en esperantaj kaj anglalingvaj gazetoj tutmondaj.

El la Bahaa literaturo ŝi esperantigis Bahá 'u 'lláh kaj la Nova Epoko, Parizaj Paroladoj, Demandoj kaj Respondoj, Elĉerpajoj el la Testamento, Bahaaj Preĝoj, La Celo de la Nova Mondordo, Al la Matureco de Mondcivilizacio, Mondreligio, k.a.

En 1937 Nacia Spirita Konsilantaro de Bahaanoj de Usono kaj Kanado invitis Lidian Zamenhof viziti Usonon, kaj la 2-an de oktobro ŝi komencis instrui sian unuan Esperanto-klason en Ameriko. Ŝi gvidis Czech-metodajn kursojn en New York, Philadelphia, Detroit, Lima, Eliot, Cleveland, prelegis en radio, en preĝejoj kaj ĉe diversaj kulturaj societoj. Entute ŝi en Usono persone interrilatis kun ĉirkaŭ 1500 personoj.

La 28-an de novembro 1938 Lidia Zamenhof revenis en sian patrujon. Minacis kaj poste eksplodis la milito. En 1942 la familio Zamenhof estis kondukita al koncentrejo. Jam antaŭe estis ĉiuj profesiaj judoj en Varsovio mortpafitaj, inter ili ankaŭ d-ro Adam Zamenhof. D-ino Zofia Zamenhof estis mortpafita en 1944. Lidia estis cindrigita kun multaj aliaj judoj en la juda mortigejo en Treblinka, proksime al Varsovio. Plejverŝajne en 1943.

La mesaĝo de Lidia Zamenhof estas unueco de la homaro, interfratiĝo, emancipiĝo de la virinoj kaj paco por la mondo. Malgraŭ siaj faroj ŝi iomete restas por la E-movado en ombro de sia patro.

## Ĉu cigano estas ofenda etnonimo?

Bernard Golden

### • **Opinio de Miroslav Malovec**

Ĉe la fino de mia artikolo "La neologismo 'gaĝo' - kontribuajo al la Esperanta slango" (Starto 3/1993, n-ro 156, pĝ. 16 - 17), redaktoro Malovec aldonis jenan rimarkigon: "Jam penetras en Esperanton la propra nomo de la cigana etno, romao, dum la vorto cigano donita al ili de Eŭropanoj, estas ĉiam pli sentata kiel ofendo kaj tial rifuzata."

Bedaŭrinde, tiu aserto ne estis objektivite demonstrita per dokumentado kaj atestaĵoj. Unue, kiuj ciganoj sentas "cigano" kiel ofendan nomon? Kiom da ili estas en la Esperanto-movado aŭ uzas Esperanton? Mi dubas, ke oni povas nombri ilin eĉ per la fingroj de nur unu mano.

### **Uzo de la gentnomo "cigány" en la hungara lingvo**

Por refuti la vidpunkton de redaktoro Malovec, mi prezentos ilustraĵojn de la publika uzo de "cigány" en hungarlingvaj kunteksto, por demonstri, ke la ciganoj en Hungario ne sentas ofendon.

### **Oficialaj nomoj de organizaĵoj kaj iliaj publikigaĵoj:**

A Magyarországi Cigányok Kulturális Szövetsége (La kultura asocio de hungarlandaj ciganoj) eldonas la dulingvan gazeton Románo Nyevepe/Cigány Újság (Cigana gazeto), kaj Phralipe/Testveriség estas la organo de Független Cigány Szövetség (Sendependa Cigana Asocio). En 1991 la Fondajo por la Hungarlandaj Naciaj

kaj Etnaj Minoritatoj apogis publikigon de Cigány-magyar, magyar-cigány szótár, dudirekta vortaro de la cigana kaj hungara lingvoj.

### **Radiofonio kaj televido**

Hungara Radio brodkastas ĉiun vendredon antaŭtagmeze duonhoran programon en la hungara lingvo titolitan Cigányfélóra (Cigana duonhoro). Ĉiusabate antaŭtagmeze oni povas spekti en la dua kanalo de Hungara Televido 25-minutan novaĵ-programon en la hungara lingvo. Unu el la titoloj estas Cigány Magazin; la alia estas Patrin - Uzenet - Vorba ("informo" en du ciganaj dialektoj kaj en la hungara). Nova duonhora TV-serio, kiu estas prezentita unu fojon monate en la vespero, estas Habiszti - kulturális cigány magazinmúsor (kultura cigana magazinprogramo). Ne mankas diversspecaj specialaj brodkasto. Aktualajo estas la 18-parta, 25-minuta radioserio Az európai cigánység népzeneje. Jam estis prezentitaj registraĵoj de kantoj kaj muziko de la ciganaro el ĉiuj regionoj de Hungario kaj el la najbaraj landoj. Ne mankas seriozaj pritraktoj de sciencaj temoj, kiel indikas la titolo Cigánykutatás'93 (Cigana esplorado '93), televiziita rondtabla interparolado pri sociologia enketo. "Frandaĵo" por la oreloj kaj okuloj estis Cigány mise Mariapöcsön, registraĵo de cigana menso en tradicia pilgrimejo.

## Konkludo

Mi povas facile aldoni pli da ekzemploj ĉerpitaj el artikoloj en gazetoj, magazinoj kaj revuoj, sed mi opinias, ke tio ne estas necesa por pravigi mian vidpunkton. La vorto "cigány" estis uzata fare de ĉiuj partoprenantoj en la radiofoniaj kaj televiziaj brodkastoj menciitaj ĉisupre - la ciganaj redaktoroj, muzikistoj, poetoj, pentristoj, verkistoj, instruistoj k.a. - kaj ankaŭ fare de gaĝoj, kiuj estis intervjuitaj. En unu el la lastaj programoj de Cigány Magazin mi zorge nombris la oftecon de uzo de la nomo "cigány": 33 fojoj en 25 minutoj. Nur unu el la duopo da hungaraj sociologoj menciis "roma"; la alia ĉiam diris "cigány". Dum pluraj horoj de sonregistrado kaj televidado mi neniam havis la impreson, ke estas provo eviti la nomon "cigány" kaj anstataŭigi ĝin per "roma". Sekve, la hungaraj ciganoj ne sentas, ke la vorto "cigány" estas ofenda, kaj pro tio ne estas iu ajn kialo tabui ĝin en Esperanto.

## Rimarkigo de la redakcio:

*En Ĉeĥio estas situacio tute diferenca. La esprimo "cigán" aŭ "cikán" fariĝis sinonimo de "mensogulo" (ekzistas eĉ verbo "cigánit" = mensogi), la vorto estas uzata kiel insulto, precipe en formo "cigoš" (ciganaĉo). Pro tio ĉeĥaj ciganoj mem komencis antaŭ kelkaj jaroj enkondukadi la esprimon "Rom" en siaj gazetoj, en televido, ilia politika partio nomiĝas "Romská iniciativa" (Roma iniciato), ĉeĥlingva lerno-*

*libro de la cigana lingvo havas titolon "Základy romštiny" (Fundamentoj de la romaa) kaj antaŭ nelonge aperis "Romsko-český a česko-romský slovník" (Roma-ĉeĥa kaj ĉeĥa-romaa vortaro). La romaoj mem petis en la televido, ke oni ne nomu ilin "ciganoj", kaj jam plurajn jarojn uzado de la vorto "cigano" estas konsiderata kiel signo de rasismo (punch, skinhead k.s.). Tiu situacio estas ĉe ni tiom konata, ke ni ne sentis bezonon iel klarigi aŭ dokumenti nian aserton. Erare ni pensis, ke en la ceteraj landoj estas simila situacio.*

## "Plakato"-falsa amiko" de ruslingvaj esperantistoj

*Bernard Golden*

### Kio estas lingva "falsa amiko"?

Lingvistoj nomas "falsa amiko" tiujn vortojn de unu lingvo, kiuj similas al vortoj de alia vorto sed ne havas la saman sencon. Francaj esperantistoj tre konscias pri tiu minaco kontraŭ la bona lingvouzo, do ili jam publikigis du broŝurojn (1), kiuj funkcias kvazaŭ nigraj listoj de vortoj, kiuj stumbligas lemantojn kaj uzantojn de Esperanto, kies gepatra lingvo estas la franca. Estos utile kompili similajn listojn por ĉiuj etnolingvoj. En tiu ĉi artikolo mi senmaskigos unu el la "falsaj amikoj" de parolantoj de la rusa lingvo: temas pri "plakato". La sekvaj citaĵoj ilustras, kiel oni misuzas ĝin.

1. "Borovkin Vladimir dez. kor. pri arto, arkitekturo, fotografio, plakatoj

kaj reklamoj.”

(Voĉo, 4-5/1978, pĝ. 93).

2. "Tjuma E-klubo organizas ekspozicion de plakatoj 'Homo kaj naturo'. Temas pri naturo kaj defendo de naturo. Bv. sendi plakatojn pri tiu temo. Ĉiu sendinto estos rekom-pencota per olimpikaj aŭ politikaj plakatoj [...]"

(Paco {GDR}, 1980, pĝ. 39).

3. "Sur domoj por impresoj

Etendiĝas tra strat'

Sur ŝnurego plakat'

"La tutan potencon al Fonda Kongreso".

(Dek Du de Aleksandro Blok, tradukita de N. Nekrasov kaj B. Tornado, Hungara Vivo, 4/1890, pĝ. 144)

## Malfidinta vortaro

Se vi konsultas la Esperantan-rusan vortaron de E. A. Bokarev, vi trovos jenan misinformon: plakato: плакат. Ho ve! Tiu malica vorto "plakato" erarigis eĉ la renoman rusan lingviston. Nun turnu vin al la alidirekta volumo, la rusa-Esperanta vortaro: плакат = afiŝo. Haleluja! El la brumo venas la lumo. La rusa vorto плакат, same kiel preskaŭ identaj vortoj en aliaj slavaj lingvoj, estas ĝuste tra-dukenda en Esperanto per la vorto "afiŝo". Malgraŭ la centjara misuzo de "plakato" / eraroj troviĝas en numeroj de La Esperantisto eldonitaj fine de la 19-a jc. - ĝi ne sukcesis enradikiĝi en Esperanto por forpuŝi "afiŝo", kiu estis akceptita en la Unua Oficiala Aldono al la Universala Vortaro en 1909. Por diri la veron, ne ĉio estas mava kaj misa en la vortaro de

Bokarev. Ĉe la vorto "afiŝo", la rusaj ekvivalentoj estas плакат kaj афиша, kaj ĉe плакат troviĝas "afiŝo" en Esperanto.

## Ankaŭ hungarlingvuloj havas la saman "falsan amikon"

Ne nur parolantoj de la rusa lingvo pekas pri "plakato", kiel atestas la sekva citaĵo. En la rubriko "Helpu!" de Eventoj (n-ro 40, 2/oktobro, 1993, pĝ. 5) aperis jena anonco.

La E-societo de la urbo Cluj-Napoca (Kolozsvar) ĉiujare organizas E-ekspozicion en decembro en la plej granda librovendejo. Mi petas la legantojn de Eventoj sendi ĉiuspecajn materialojn, gazetojn, librojn, afiŝojn, plakatojn, ktp. por subteni ilian agadon... Dankon por via helpo. László Szilvási."

S-ro Szilvási, la redaktoro de Eventoj, ne povas kulpigi hungarajn Esperanto-vortarojn, ĉar la hungara vorto plakát estas ĝuste tradukita per "afiŝo". Li simple pensis hungare kaj skribis Esperante.

## Noto 1

Roger BERNARD kaj André Ribot. Malfacilaĵoj en Esperanto: falsaj amikoj. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj; 1971, 39 pĝ. Faux amis, faux parents, "étrangers" / Falsaj amikoj, parencoj, fremduloj. Beuville > SAT-Broŝurservo; 1990, 62 pĝ.

67-a SAT  
KONGRESO  
Stražnice  
16.-23. 7.  
1994



## VIZITU RIPOZELJON SKOKOVY

**Internacia Printempa Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj** en ripozcentro **Espero** en vilaĝo Skokovy la 29. 4. - 1. 5. 1994 sub aŭspicio de ĉeĥa Unio de Naturamikoj en Jablonec, KTTATRAN, Jungmannova, 14. Samtempe okazos ankaŭ lingva seminario de esperantistoj-handikapuloj. Vi povas veni ankaŭ frumatene la 30an de aprilo kaj partopreni ekskurson tra pitoreska rokaro Drábské světničky, 10 km entute. Se vi venos trajne al Loukov, skribu, nia aŭtomobilo atentos vin. Eblas tranokti malmultekoste en kvarlitaj kabanetoj aŭ en propra dormosako kaj partopreni bivak-fajron. Se vi venos per aŭtomobilo, sekvu la ŝoseon al Sobotka tra vilaĝoj Žďár kaj Žehrov, de kie eblas uzi flankvojojn al Skokovy. Bonvolu skribi rapide: nomon kaj aĝon, tagon de alveno (ĉu trajne - buse - aŭte), kiom da tagoj vi restos, ĉu vi mendas liton en la domo aŭ kabano. Adreso: **ESPERANTO, M. Jíra, Mechová 8-32, 466 04 Jablonec nad Nisou.**

Doc. Jaromír Šikula

### Tradicia kaj moderna medicinoj

Malsano akompanas vivon de homoj ekde la komenco de ekzisto de vivaj organismoj. En antikvaj epokoj vivis specialistoj, kiuj ne nur multon konis, sed ankaŭ multe skribis pri malsanoj kaj pri metodoj de ilia kuracado.

En la antikva Grekujo pleje famiĝis

Hippokrates, kiu vivis en la 5a kaj 4a jarcentoj antaŭ Kristo. Ni en Eŭropo nesufiĉe konas la kuracajn metodojn en la antikva Egiptio, Babilonio, Asirio, Hindio aŭ Cinio. Tamen multajn gravajn informojn ni scias el la libroj de la fama kuracisto Galenos, kiu vivis en la antikva Romo. Tre interesajn metodojn de kuracado ni povas trovi ankaŭ ĉe arabaj kuracistoj, precipe ĉe Aviceno kaj Rhazes.

El eŭropanoj famiĝis dum la 16a jarcento, en epoko de la renesanco, germana kuracisto Paracelzo. Liaj metodoj baziĝis sur eksperimentaj ekkonoj. La unuajn eksperimentojn kaj metodojn science bazitajn alportis lordo Bacon el Verulamio.

Malvarmumo ĉiam signalas, ke en la korpo de paciento io ne estas en ordo. Simile, se oni sentas varmon en iu organo. Laŭ varmo aŭ malvarmo oni aplikis terapion: malvarman aŭ varman fomentaĵojn. Kiam la paciento sentis malvarmon, oni uzis preparaĵojn, kiujn la malsanulo perceptis kiel alporton de varmejo je la unua, dua aŭ tria grado. Se iu male sentis varmon ekzemple en la ventro, oni almetis al la ventro glacian fomentaĵon. Tiu ĉi metodo helpas ĝis nun, ekzemple kiam iu sentas doloron en la apendico. Ankaŭ se ni ekzemple kapdoloras, helpas analgezikoj. Tiuj ĉi metodoj estas alopatiaj, bazitaj sur kontraŭaĵoj.

Alia metodo estas la homeopatia de doktoro Hahnemann. Laŭ ĝi oni preskribas malgrandajn dozojn da medikamentoj. Kiam oni uzis tro multe da medikamentoj ekzemple kontraŭ malario, aperis simptomoj similaj al tiuj ĉe malario, dum post



apliko de malgrandaj dozoj la simptomoj malaperis. Doktoro Hahnemann formulis gravan latinan frazon: "similia similibus curantur" (similaĵo similaĵon kuracas). Malsanojn povas kuraci preparaĵoj, kiuj elvokas similajn simptomojn kiel la malsano mem.

Ankaŭ kuracplantoj, denove fariĝis modernaj, sed ofte laikaj kuracantoj nesufiĉe konas ĉiujn iliajn efektivajn influojn je korpaj organoj kaj kontraŭ malsanoj. Tial ili povas la pacienton facile damaĝi.

Novaj metodoj en medicino staras sur enzima bazo. Tio signifas, ke aminoacidoj povas helpi por plibonigi diversajn funkciojn de la organoj en nia korpo. Plej utilaj estas enzimoterapioj por kuraci la digestadon, la metabolajn malsanojn ktp. Nia opinie la novaj enzimaj terapioj povas kuraci individuajn organojn kiel renojn, hepatojn ktp. ne nur en iliaj funkcioj, sed ankaŭ en individuaj ĉeloj, tial ni parolas pri ĉelaj metodoj.

En la dua duono de la XX-a jarcento modernigis terapioj sur la bazo de nutraĵo: ni ekkonis la influojn de diversaj nutraĵoj je funkcioj de individuaj organoj de nia korpo kaj per helpo de elektitaj nutraĵoj ni povas la malbonajn funkciojn plibonigi, kaj parte ankaŭ ripari ĉelojn de organoj.

En naturo, kie ne ekzistas kuracistoj, helpis tiu ĉi terapio kiel tre efika metodo, kaj ankaŭ por la estonteco oni supozas, ke kuracado de modernaj homoj de la 21-a jarcento efektiviĝos per specialaj nutraĵoj. Kaj ankaŭ per helpo de diversaj psikaj metodoj, similaj al nuntempaj jogaj teknikoj kaj meditadoj.

## Pavel Tigrid pri Esperanto

La librovendejo de Michal Ženišek en Brno invitas de tempo al tempo popularajn personojn enlandajn, ĉu literaturistojn, ĉu aliajn agantojn en la kultura sfero, por tie subskribi siajn plejparte ĵus aperintajn librojn. Por la 25a de marto akceptis la inviton Pavel Tigrid, dediĉinta kvindek jarojn de sia ekzila vivo al la kulturo de sia naskiĝlando, kaj la ĵusa ministro pri kulturo de Ĉeĥa respubliko.

Inter longa vico de interesuloj kun koncernaj libroj subbrake (ĉar en la lokaj librovendejoj ili estis finvenditaj) estis ankaŭ la prezidanto de la E-klubo en Brno, Zdeněk Hršel. Demandite de li, ĉu estas vere, ke li havas simpatian al Esperanto, Pavel Tigrid respondis emfaze: "Tiu mi ĉiam havis!" ("*Tu jsem vždycky měl!*") Poste li aldonis kvazaŭ pardonpetante, ke la lingvon li ne regas. Informite - dum subskribado de alia libro - pri la traduko de Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek, kiu estas preparita por presado, kaj pri la ekzisto de la fondaĵo ELFO (Esperantista Litaretura Fondaĵo), li esprimis sian kontentecon pri tio per la vortoj: "do vi sukcesis aranĝi ĝin" ("*tak se vám to podařilo*").

Ni povas ĝoji, ke la kulturministro de Ĉeĥa respubliko estas nia simpatianto, al kiu ni ne bezonas prezenti argumentojn pri valoroj de Esperanto.

(Rim.: Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek en traduko de J. Vondroušek aperos dum SAT-kongreso en Strážnice.)

## Pastro ne predikas dufoje

Rememore pri Sankta Vojtěch-Adalberto

Tiu ĉi proverbo aŭ parolturno estas konata al ĉeĥoj (kiomfoje tiel replikas al mi mia panjo!), sed ne al fremduloj (inter ili ankaŭ Ivo Lapenna), kiujn mi atentigas en Prago, ke "en tiu ĉi preĝejo pastrorompis, je mia peto, la proverbeton, ke pastro ...". Kaj mi devis klarigi. Ĉu ankaŭ vi tion deziras?

Do, en la jaro 1947 estis rememorata en nia lando la 950-jara datreveno de morto kaj samtempe sanktiĝo de la ĉeĥa episkopo, homo tre klera kaj pia, Vojtěch (Adalberto). Antaŭ tiom da jaroj li estis murdita de paganaj prusoj, al kiuj li estis veninta konigi la kristanisman. Adoras la sanktulon ne nur ĉeĥoj, sed ankaŭ poloj, en kies urbo Gniezdno (ĉeĥe Hnězdnno) li trovis la postmortan ripozon. (Pasintjare okazis solenado pro 1000 jaroj de la benedikta monaĥejo en Praha-Břevnov, kiun fondis ĝuste Sankta Vojtěch en 993).

En tiu 1947-a jaro okazis en Prago rememoraj solenaĵoj pri Sankta Vojtěch. La Ligo de katolikaj esperantistoj aranĝis eĉ Esperantan meson en la preĝejo de Sankta Ursula (Voršila, strato Národní), kun internacia partopreno. La meson celebris kaj tie predikis la belga pastro Alfons Beckers. Mi, kiel profesia laboranto de la esperantlingvaj elsendoj de Radio Praha, estis sendita de la ĉefo Tosek kun surbendiga aparataro, por sone registri iom el la meso, cele de posta elsendo. La predikejo troviĝas tie ĉe la muro fronte al la strato, kaj mia teknikisto instalas tie la mikrofonon. Tiu registris la tutan predikon. - Mi estis kontenta pro tiu neordinara okazo. TAMEN! - Post la mesofino la

technikisto surprizis min per sia konstato, ke la preterpasantaj tramoj iom perturbis la kvaliton de la surbendigokaj proponis al mi, ĉu la pastro bonvolus ripeti la predikon (!) en iu son-imuna loko. Mi terurigiĝis, konante la proverbon (ĉu ĝi povas esti eklezia preskribo?) kaj devante tion diri al la samideana pastro. Sed mia timeto montriĝis senkaŭza. S-ano Beckers invitis nin du en la sakristion, kaj tie, per la sama altŝveba voĉo kiel en la navo, li predikis je la dua fojo la samon! - Kaj la radio-elsendo estis savita. Mi tiel devis, senvole, malobei tiun ĉeĥan admonan preskaŭ-preskribon.

La pastro A. Beckers en Bruselo sciigiĝis, ke tiun okazintaĵon mi menciis en la "Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio" de Stanislav Kamarýt (eld. 1983; p. 162); li ekdeziris posedi la libron. Volonte mi ĝin donacis al li.

Jaroslav Mařík

### E-klubo Olomouc

Pri UK Valencio 1993 prelegis por klubanoj en Olomouc s-ano Drahomír Kočvara el Ostrava (23.11.1993). Kiel reprezentanto de "Esperanto Olomouc" partoprenas diversajn vetkurojn s-ano Jindřich Tomíšek ekz. Silvestran vetkuradon en Moravský Beroun, vetkuradon de persistemuloj el distrikto Olomouc 8. 1. 1994, vetkuradon "La vintra Blaník" en Vlašim 15. 1. 1994 ktp.

**Donacoj por ĈEA:**  
**800 Kč - anonimulo**

## *Saluto de stelulino el Britujo*



Lovecall, en kiu malsubtilega eĥo venas de la balkono, kaj ŝi malsupreniras la ŝtuparon kun tomahako en la formo de telefona ricevilo...  
Koen Edeling: *Twentsche Courant*



...tondraj manklakoj salutis la nepran stelul(in?)on de la Viena Kongreso: fratlinon Barlaston. La ŝereema praonklino ja kontribuis, kiel ĉiuj antaŭe, muzike – sed kun la pluso de siaj vort- kaj korpŝercoj. Ŝi nepre perdis iom da populareco kiam ŝi ne cedis al la revokogaj aplandoj kaj bisoj. Sed necesis lasi la scenejon...  
István Ertl, *Esperanto*

## La furora praonklino

Interesan novaĵon por Universala Kongreso konsistigis la kabareta prezento de Fratlinio Barlaston. Ŝi nepre venis de Britujo kaj nepre estas esperantisto, ĉar inter la koncerto-piano akompane ludita de Elena Puhova kaj dek sep glasetoj da ŝereco ĉifonis du flagoj: la verda, kaj la brita "Union Jack". Ŝian aĝon kalkulu mem: ŝi diris ke Giacomo Puccini persone amikis al ŝia patrino, kaj ke ŝi mem – imagu! – iam dancis en Viena Esperanto-kongreso kun Roger Bernard, "tiu romantika franco". La fako de Fratlinio Barlaston estas muziko, opera kaj opereta, kun repertuaro ĉerpita el *Tosca*, *My Fair Lady* kaj *Mikado*. Se ni kredas la onidirojn laŭ kiuj sub la fantaziaj kostumoj – el ili unu farita el "dek kvin metroj da veluro kaj tri kokinoj" – kaj sub la brita praonklina eksterajo kasiĝas iu tute alia ol aĝa britino, ni des pli alte rajtas taksi la kanto-kapablojn de Fratlinio Barlaston.

Ŝia spektaklo ja estas kabareto, kio jam preskaŭ senescepte signifas humoran monologon kun vortludoj, malbrudaj ŝercoj kaj senrespektaj aludoj al konataj homoj. Dum la prezento memcitiĝis, krom Roger Bernard, la prezidanto de UEA John Christopher Wells, la libroservo-respondeculo Pasquale Zapelli kaj eĉ la ĝenerala direktoro, kies unua nomo kabaretiĝis al "Simio". Kantista ino, do: en ŝi mem jam aŭzara specio. Krome maljuna, kaj brite-sprite misparola. Kiam oni ŝatas ion pri kio oni iomete ankau hontas, eblas tamen omaĝi al ĝi per ridindigo. Estu ĝi trodolta muziko, aŭ praonklinoj, aŭ – Esperanto mem.

...F-ino Barlaston konas nederlandan ĉef-ministrinon Ruud Lubbers kaj UEA-prezidanton John C. Wells ekde ilia vindotuka aĝo...  
Giulio Cappa: *Esperanto*

...Ni koncertis, korusis, kabaredis Barlastone...  
John C. Wells: *Esperanto*

...Plej plaĉis fratlinio Barlaston!  
Michel Pilger, John C. Wells, Bengt-Arne Wickström

La feste haosan finon [de la spektaklo] enkondukis fratlinio Emily Barlaston, kiu persvasadis la publikon kunlaberi en "Land of Hope and Glory" laŭ la maniero konata en la Last Night of the Proms. La "grand old lady" kunportis por ni kornojn, sonoriojn, paper-serpentiaĵojn kaj flagojn. La publiko estis jam entuziasma dum la duonhoro antaŭ ĉi tiu fina kabaretaĵo pro bonegaj skeĉoj fare de Barlaston kaj ŝia partnero James Hutchinson [baritono]. Elĉerpaĵojn el la operoj "Carmen" kaj "Don Giovanni" ŝi atakis kun profesieco. Tial por la 'Prom' jam estis multe da ekscito, kaj unu sinjoro eĉ stariĝis por entuziasme direkti la orkestron; kaj la publiko kune kantis el plena koro.  
*Dagblad Tubantia*, 14.6.1993

## F-ino Barlaston ridigas politikan partion

La C.D.A.-publiko en la plenplena salono Assinkhof auzis sin hieraŭ vespere ne nur je politikaj paroladoj de la propraj partiestroj, ekzemple ĉefministro Lubbers [de Nederlando] prezidanto Van Welzen kaj ministro pri justico Hirsch Ballin. Komike artan kulminon provis la fama brita 'emerita primadono' fratlinio Emily Barlaston... Per sia prezentado ŝi sukcese ridigis la tutan publikon. Akompanate de pianisto Andrew Wise, ŝi proponis perfektan interpreton de Vissi d'arte el "Tosca" de Puccini. Por la prom-intentaj gastoj ŝi havis donaceton: kompaktan diskon de – opero, kompreneble...  
Charel van Tendeloo, *Twentsche Courant*

...Fratlinio Emily Barlaston ludas rave per voĉalto, genro, kaj klasikajoj el la opero kaj la muzika komedio... Burĝa sinjorino kun hartubero senmaskigas sin japana militanto el *The Mikado* (Sullivan), en kiu multo misas, sed ŝi ridigas la tutan teatron...  
Frans Mulder: *Dagblad Tubantia*

...Estis fratlinio Emily Barlaston kiu donis impeton al la spektaklo per *Let's call the whole thing off*, la plej fama kvetero el la historio de la muzikalo, kaj kompletigita per klakdancado kaj eta vals...  
...mi forte insistas ke tiu, kiu povas unuigi efektan absurdecon kaj senkomparan teknikon, estas fratlinio Emily Barlaston. Ŝi surprizas la publikon ree kaj ree, ekzemple en *Indian*

[Emily Barlaston], kiu aperis en kostumo kvazat kreita de Dame Edna, kune kun Hutchinsonson senspigris la publikon per la dueto 'La ci darem la mano' el 'Don Giovanni' de Mozart.

La absolute alta parto de la vespero estis ia 'Last Night of the Proms' kiun fratilino Emily aranĝis kaj el kiu ŝi faris veran okazaĵon, pere de la brila kunkantiga numero 'Land of Hope and Glory' de Edward Elgar. Prepare al tiu ĉi kanto ŝi jetis flagojn, kornojn kaj paper-serpentaĵojn en la salonegon de la plenplena teatro Twentse Schouwburg.

*Twentsche Courant*, 14.6.1993

## ... kaj same adorata de l' publiko

Ah, tiu kabaretema fratilino Emily Barlaston! La kongresanaro, kiun ŝi konkeris jam pasintjare, pretas kredi tion pri ŝi. Eĉ ke ŝi estas honora oficirino de la Ruĝa Armeo. Nu, post la glorigaĵoj en Valencio ŝi certe promociiĝos al sub-kolonelo... en admirinda ridinda vesto de Carmen kaj kun tiis fama ariolo Cetero, la vesto estis forstriptizita, kaj aperis Barlaston en sia kutima, angle rigora kostumo.

La publiko ĝuis: la brilan dueton de Emily kaj Elena Puhova, ŝia fidela pianistino, la arion de Tosca, la magiaĵojn, eĉ la katenadon de senkulpa junulo al seĝo... Iel ajn, aplaudego ne mankis, la publiko restis kontenta pri sia adorata(ĵo).

Mikael Bronŝtejn, *Esperanto*, sep. 1993

## Reveno de Emily...

...Jande la atendata burleskulino finfine kontentigis sian jam entuziasman admirantaron, kiu venis amase plenigi la teatrosalondon. Kaj, fakte, fratilino Barlaston estas unika figuro en nia jam vasta kaj bunta spektakla panoramo. Ŝi vere sprita, verve, pliaj virtutoze kapablas amuze agresi la publikon kaj eksplodigi aplaudojn, per la ŝokdiroj, la movoj, la partoprenigo de la spektantaro, precipe per la kantadoj, kie vibre moduliĝas surpriza soprana kaj kontralta voĉo kun abruptaj faloj en virbasaj tonoj... Jes, ja, pli ol kabareda temo pri klatneca (en bona senco) spektaklo, sed de homo, kiu kapablas ĝisfunde eksploati ĉiujn trukojn de la metio. Jes, la pasintjaraj panegiroj ne troigis. Brave, revenu denove, fratilino Barlaston!

Aldo de\* Giorgi, *Heroldo de Esperanto*

## F-ino Barlaston la stelulino en 'Drie maal alleen'

La mistera soprano fratilino Emily Barlaston, O.B.E. montris sin hieraŭ vespere la absoluta stelulino en la unika programo 'Drie maal alleen' [Tri foje sola]... Falante kaj restariĝante, la operkantistino ĝojigis la atskultantaron per elekto el muzikaj komedioj, tiel nova kiel ĝi estis ridiga...

*Dagblad Tubantia*, 24.9.1993

Fratilino Emily Barlaston O.B.E. (Ordeno de la Brita Imperio) iras kun pleto plena je heroo tra la ventiblo... 'Would you like some?' kaj stumblande ŝi pluiras sian vojon. Poste ŝi stumblas sur la scenejon... Botelo, glasaĵ kaj antaŭo sur la piano, muzikisto Hans Middelhuis senĝene sobra malantaŭ ĝi. Fratilino Barlaston, 'emerita sopranelino' - komencas sian unuan kanton.

Fratilino Barlaston estas kreaĵo, kaj plie, tiel bela kreaĵo, ke jam ne gravas kiu staras malantate. Glaso post glaso, ŝi lubrikas al ŝi la gorĝon kaj kantas peccino el muzikaj komedioj kiel 'My Fair Lady', 'The Hot Mikado' kaj 'Crazy for You'. Temas pri la rakontado de historia historio pri la pianisto, kiu restas senmove kun unu glitŝuo en la relo de travojo - ne demandu kiamaniere. Pro ridado vi povus preskaŭ forgesi ke vi addas gloran voĉon... la 'very British' eks-soprano.

Hans Beuzel, *Twentsche Courant*


...En Kopenhago... la nerezistebla Fratilino Barlaston surprizis kaj ridigis nin...

Sten Johansson, *Esperanto*

...Emily Barlaston - ikke helt almindelig. Sidste år optrådte hun i Wien ved esperantos verdens-kongres. Bifaldet ingen ende ville tage.

EH, Nit, Danlando

*Ĉiun bonan por 1949*  
de  
*Emily*



## Plej novaj informoj el komitato de ĈEA

Januare kunsidis la komitato en Skokovy, en la pensiono "Espero". Komitatanoj konatiĝis kun tiu ĉi riĝo, kiu petas akcepti unuavice esperantistojn. Kvankam privata, ĝi povas kontribui al societa vivo en Esperantio. La komitatanoj konstatis ĉiuf flankan bonegan nivelon de la pensiono, situanta en alloga regiono kaj varme rekomendas al ĉiuj esperantistoj eluzi eblecon renkontiĝi en ĝi.

La programo de la komitata traktado havis gravajn punktojn, el kiuj menciendas: Akcepto de fina kalkulo de la 1-a komuna ĉeĥa-germana Esperanto-kongreso en K. Vary. Maniero de plua funkciado de asocia oficejo, pri ties problemoj mi informis la membraron en alia artikolo de ĉi tiu numero de Starto. Plue kompletigo de komitato pro retiriĝo de la sekretario, plua disdivido de la asocia agado inter komitatanoj. La komitato ankaŭ diskutis pri proponitaj diversaj esperantistaj aranĝoj en Ĉeĥa Respubliko kaj fine ĝi akceptis asocian kalendaron, kiu jam estis publikigita. Poste diskutigis preparoj de venontaj kongresoj de SAT (Strážnice 1994) kaj eventuale UK (Praha 1996). La komitato decidis organizi la jarkonferencon de ĈEA novembro en Česká Třebová kaj tiucele ligis kontakton kun loka Esperanto-klubo "Amikeco".

Estis aprobitaj datoj de komitataj kunsidoj en 1994 (7. 5., 18. 6., 27. 8., 8. 10., 6. 11. kaj 10. 12.).

Februara komitat-kunsido okazis en

Prago en la asocia oficejo. La komitato kompletigis sian nombron laŭ la statuto - samideanino Květa Hubnová el Praha estas nove nomumita komitanino. Ŝi transprenas plenumon de taskoj, kiujn necesas fari en sidejo de la asocio. Por loko de librotenisto de ĈEA estis varbita fakulo - samideano Jiří Patera el Praha, kiu jam eklaboris. Zorgi kaj organizi asociajn skribajn kursojn de Esperanto estas nova tasko de komitanino Vlasta Janáková el Trutnov. La asocio ekde nun havas ankaŭ novan korespondan adreson: ĈEA, poŝta kesto 1069, 11121 Praha 1 (la sama kiel Esperanto-klubo en Praha).

La komitato longe diskutis pri mastrumado de la asocio en la jaro 1993. La fina rezulto estas malprofitaj kaj tial la financa stato de la asocio restas tre streĉa. Pro tio estis forte restrikiita la budĝeto por 1994, malgraŭ tio ni devas serĉi novajn monfontojn. Estis ankaŭ akceptitaj kelkaj administraj decidaj ligoj al financaj operacioj kaj la komitato kontrolis preparlaborojn de la preparataj kongresoj. Konstatite, ke intereso pri kongreso de SAT estas malpli alta ol atendite, en la unua aliĝperiodo aliĝis nur pli ol 100 geesperantistoj. Fine la komitato traktis pri agado de lokaj kluboj, kiu laŭ informo de la prezidanto estas malkontentiga. Kelkaj el ili kunvenadas nur neregule aŭ okaze, kelkaj eĉ tute ne funkcias: la poŝtaĵoj revenas pro "nekonata adresato". La komitatanoj transprenis taskon aktivigi klubojn.

V. Kočvara

# P ř i h l á š k a

na 67. kongres SAT ve Strážnici 1994-07-16/23  
ceny platí jen pro občany České Republiky  
(ceny v závorce pro občany Slovenské Republiky)

## Místní organizační výbor:

**Předseda:** Petr Chrdle      Tel., Fax: 02/9912126  
**Tajemník:** Vladislav Hasala      Tel.: 0631/942507, Fax: 0631/942225  
**Členové:** Jana Melichárková  
Stanislava Chrdlová

**Korespondenční adresa:** 67. kongres SAT  
pošt. schránka 36  
696 62 Strážnice

## Kongresové poplatky pro české (slovenské) účastníky:

členové SAT	700 Kč	Hosté:	1000 Kč
SAT - manželé	1100 Kč	Hosté - manželé	1400 Kč
SAT - mládežníci	350 Kč		

Děti: Pro děti v rozmezí 4 až 14 let poběží paralelní program v době pracovních zasedání. Za děti v tomto věku se platí poloviční kongresový poplatek oproti mládežnickému tarifu, podle příslušného data platby, plnou cenu za ubytování a plnou cenu za stravování, resp. 60% v případě požadavku dětských porcí.

## Turistický předkongres v Praze:

je celotýdenní (1994-07-09/16), s polodenním výletem na Karlštejn a celodenním (Svatá Hora, Č. Budějovice, Hluboká), s možností účasti jen programu posledních tří dnů (1994-07-14/16). V jednání je možnost připomenutí založení SAT v Praze na Žofíně v roce 1921, umístěním pamětní desky. Informace a přihlášky: P.Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobříšovice, Tel./fax: (02) 991 2126.

---

## PRÍHLÁŠKA NA 67. SAT-KONGRES, STRÁŽNICE, 1994-07-16/23

Příjmení: ..... Jméno:.....

Adresa:.....

Telefon: ..... Narozen(a): ..... Číslo OP:.....

Vegetarián: ano / ne

Jsem ochoten (ochotna) přispět do programu (čím):.....

Návrhy, ev. připomínky:

**Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1**

**\* STARTO \***

Periodikum Českého esperantského svazu.

Vychází 6x ročně a je určen členům svazu.

**Redaktor:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

**Administrátor:** Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno

**Evidence adres:** Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare.

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio.

Abonprezo: 15 gld

**Redaktoro:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

**Administrato:** Karel Daněk, p. k. 425, 660 25 Brno

Ĉeĥa Respubliko



# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno, č. j, P/3-8847/91  
ze dne 28. 8. 1991

Podávací pošta: 664 03 Podolí u Brna